



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Junio 2018 n-ro: 30



## *Merhaba,*

Haziran sayımızla gene birlikteyiz ve bu sayımızı da sizlere ePUB formatında iletiyoruz. Bazı kişilerden bu konuda çok pozitif reakasyonlar aldık, bazıları ise ne kitap okuyucusu ne de akıllı cep telefonu veya tablet kullanmadıklarını ifade ettiler. Onlar için pdf formatındaki dergi yeterli görünüyor.

Bazı kişiler derginin basılı olarak da gönderilmesini istiyor. Ancak bu konuda maliyetlerin çok yüksek olması ve posta ile de yılda 12 sayının abonelere iletilmesindeki zorluklar ile postada yaşanabilecek aksaklıklar göz önüne alındığında bunun yerine getirilmesi imkansız bir istek olduğu gösteriyor.

Bu sayıda da gene birbirinden ilginç yazılar sizi bekliyor.

***Hepinize iyi okumalar !***

## *Saluton,*


Ni denove estas kune kun vi per nia junia numero, kiun ni ankaŭ sendas al vi en ePUB formato. Ni ricevis tre pozitivajn reagojn el kelkaj esperantistoj pri tiu temo. Sed kelkaj diris, ke ili nek uzas e-libro-legilon nek saĝan poŝtelefonon aŭ tableton. Por tiuj la simpla pdf formato ŝajnas esti sufiĉa.

Kelkaj esperantistoj esprimis siajn dezirojn por ricevi la revueton presita sur papero. Tamen se ni konsideras la altajn kostojn de tiu alternativo kaj ankaŭ la malfacileco poŝti 12 numerojn jare al la abonantoj kaj la eblaj poŝtaj problemoj, tio montras, ke tiu deziro estas ne plenumbla tasko.

En ĉi tiu numero ankaŭ estas tre interesaj artikoloj atendante vian legadon.

***Bonan legadon al ĉiuj !***

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Fondaĵo MONA	4
Ivan kaj Ĵan	4
PERSEO (ΠΕΡΣΕΥΣ)	6
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 4)	8
Hungaraj nekonataj verkistoj kaj poetoj	8
El la libro de "Dao de Ĵing" (22)	10
La dezertinto	11
Esperantaj cigaredoj	13
Nia bela Tero	13
Entuziasma Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo	14
Ŝercoj	15
Facilaj Rakontoj	15
Mallonga Historio de Filozofio (29)	16
Kurcvortenigmo	17
La vojo de evoluo	18
Ĉu esperantistoj bezonas propran valuton?	20
Pri ENA	23
Estas Printempe (Facila)	24
Poemoj	24
Qingming-Festo	25
Nacia Esperanto Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj	26
La deveno de Songkran-tagoj	27
Peto al la Printempa Vento (facila)	28
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 1)	28
La ŝrumpado de UEA momente haltis	30
Trezoro Huang Yinba –nova estrarano de UEA	31
Korespondante kun la pasinteco	32

## Kursoj




Pro la somera sezono nun estas neniuj aktiva Esperanto kurso en Turkujo.

Okazis lerneja projekto pri artefaritaj lingvoj kaj ĉefe pri Esperanto en la lernejo **"Konya Bozkır 15 Temmuz Şehitleri Mesleki ve Teknik Anadolu Lisesi"**, en urbo Konya en la centro de Anatolio, kadre de **"TÜBİTAK 4006 Bilim Fuarı"** (Scienc foiro 4006 organizita de la "turka organizo pri sciencaj kaj teĥnikaj esploroj"). La nomo de la projekto estis **"Lingvo kiu alportas esperon"**. En la projekto partoprenis sep lernantoj el la 9-a kaj 10-a klasoj kaj diskutis la temon: *"Ĉu povas esti komuna artefarita lingvo en la estonteca mondo aŭ ne?"*.

La gvidinsturistino de la projekto, *Nazmiye Koydemir*, informis, ke la lernantoj esploris la artefaritajn lingvojn kaj lernis la gramatikon kaj ligvosturkon de Esperanto.

Ĉar la celo de Esperanto lingvo estis miskomprenita, ili konkludis, ke *"artefaritaj lingvoj kaj Esperanto ne povas anstataŭi naciajn kaj gepatrajn lingvojn ĉar estas kulturo kaj tradicio ene de tiuj lingvoj kiujn homoj ne povas forlasi"*. Mi diskutis surrete kun la instruistino kaj provis rakonti al ŝi, ke Esperanto ne celas anstataŭi niajn lingvojn sed celas nur anstataŭi la anglan kiu ŝajnas esti la monda internacia lingvo kaj mi klarigis, ke tiun rolon antaŭ malpli ol unu jarcento portis la franca. Mi ankaŭ donis al ŝi parton de la artikolo el nia retejo: **"Por pli bone kompreni Esperanton"**.

Do kvankam la projekto el la vidpunkto de Esperanto estis maltrafa, grupo de lernantoj esploris kaj iomete lernis la lingvon. Jen du bildoj el la lerneja projekto de ties prezento en la lerneja foiro senditaj de la instruistino :



## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



La 52-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 13-a kaj 27-a de majo. La rezultojn ni raportos en la julia numero de Turka Stelo.

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 5 grupoj. Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata Jokozuna. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: Oozeki, Sekiŭake, Komusubi, Maegasira.

Okaze de tiuj konkursoj, mi proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj. Tiu estas la Esperanto-Sumoo konkurso en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj ni legu Esperanto-librojn dormantajn en nia breto.

Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon.

**Ni partoprenu kaj luktu ĝoje!**

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 734 (2018-05-14)

**Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la**

**Internacia Tago de Familioj 2018 proklamita de Unuiĝintaj Nacioj 15 majo 2018**

La temo de la ĉi-jara Internacia Tago de Familioj estas "Familioj kaj inkluzivaj socioj." Nome de la miloj da Esperanto-parolantaj familioj, kiujn ĝi bonvenigis inter si tra la jaroj, Universala Esperanto-Asocio esprimas sian daŭran sindediĉon al socia inkluzivo [...]

N-ro 733 (2018-05-02)

**Reĝa ordeno por Rob Moerbeek**

Rob Moerbeek, honora membro de UEA, ricevis nederlandan reĝan Ordenon de Oranje-Nassau. La urbestro de la urbo en kiu Rob Moerbeek loĝas, Beverwijk, speciale venis al Roterdamo por enmanigi la ordenon kaj gratuli la samurbanon dum la Malferma Tago de UEA [...]

N-ro 732 (2018-04-15)

**Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Woodstock 2018**

UEA kaj la Eŭropa Komisiono de UEA petas vian helpon: Helpu nin kolekti € 4 500 por realigi Esperantan agadon en aŭgusto 2018, dum la junulara festivalo Woodstock. Al ĉiuj 2 € donacotaj, UEA aldonos 1 € el la propra buĝeto, tiel ke organizantoj ricevos entute la sumon de [...]

## TEJO



**Partoprenu SES2018 en Slovakio nome de GEJ –**

**Germana Esperanto Junularo**

Ĉu vi ŝatus partopreni **SES 2018 – Someran Esperanto-Studadon**

en Liptovský Mikuláš, Slovakio, nome de GEJ – Germana Esperanto Junularo?

Liberas ankoraŭ unu loko pere de stipendio Erasmus+!

Kondiĉoj por kandidatiĝi

– vi aĝas malpli ol 28 jarojn (do ne ankoraŭ 28)

– vi pretas aliĝi al GEJ

Vi povas vojaĝi al SES el iu ajn lando de Eŭropa Unio. Por ekhavi detalojn kaj kandidatiĝi, sendu mesaĝon al

[gro.ojet@uxgitadidnak](mailto:gro.ojet@uxgitadidnak) ĝis la 20-a de majo 2018. [...]

**Komitatanoj A de TEJO 2018-2020**

Venis la tempo por nomumi Komitatano A de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2018 ĝis la 31-a de majo 2020 (vidu la ĉapitron 3.2 de la TEJO-reglamento). La komitatanoj A estas reprezentantoj de la landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO.

Krome, ĉiu nomumita Komitatano A membru dum sia oficperiodo minimume en unu el la jenaj komisionoj, laŭ propraj intereso: [...]

**Esperanto-ateliero en Roterdamo**

Ateliero por malkovri la lingvon kaj la mondon de Esperanto okazos en Roterdamo la 19-an de majo de la 10:15 ĝis la 17:30.

La partopreno estas senpaga (inkluzive de lernomaterialo kaj eta bufedo).

Aliĝoj kaj informoj: [gro.ojet@ofni](mailto:gro.ojet@ofni)  
Tel. +31 10 436 1044 [...]

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Koran dankon pro via belega kaj nepre leginda Turka Stelo!

**Maria Nazaré Laroca**, el Brazilio



Karaj sumoo-istoj,  
Eldoniĝis belega revuo Turka Stelo redaktita de Vasil, prizorganto de la Sumoo.

**HORI Jasuo**, el Japanio



Mi skribas por gratuli vin. Turka Stelo firmiĝis en la scenejo de nia moderna Esperanta kulturo! Ni jam atendas ĝin ĉiumonate. Ni ĝuas ĝin. Ĝi havas stilon, animon, propran vervon! Krome: ĉu vi rajtas nomi ĝin "revueto"? Ĉu 32-paĝa, regula, riĉenhava periodaĵo estas "revueto"? Vi starigas markon en nia verda mondo! Longan vivon al Turka Stelo!

**Paulo S. Viana**, el Brazilo

## Fondaĵo MONA

## Peto pri financa subteno



UEA – UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko**

*Komisiono pri Agado en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko*

## Fondaĵo MONA

UEA ĵus starigis la Fondaĵon MONA por subteni la agadojn en la landoj de Meza Oriento kaj Norda Afriko, kiuj estas ĉiam pli rezultodonaj. Vidu, ekzemple, la retajn paĝojn <http://esperanto.net/ar/> en la araba.

Ni zorgas ankaŭ pri rektaj anoncoj pri Esperanto en arabaj Facebook-paĝoj, pri sendado de lernolibroj al dezirantoj, kaj pri multaj aliaj kampanjoj.

Zamenhof diris: al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinaro nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta. Pro tio ni mem, la simplaj kaj sinceraj esperantistoj, devas fari la laboron kaj subteni finance la laboron. Nia komisiono bezonas vian helpon, ankaŭ por ke gejunuloj el nia regiono ekaperu en la internacia movado. Pagmanieroj estas tiuj kutimaj al UEA, <https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>, kun la indiko "MONA".

Dankon!

للإسبرانتو و متحدث متحدث ألف

## Ivan kaj Ĵan

**R**icevinte informon pri sia translima oficovojaĝo li tuj decidis: se eblas, revenante li nepre renkontiĝos kun sia unua korespondanto.

Tio okazis, kiam li estis en la lasta klaso de la gimnazio. En kurso li lernis Esperanton. Post la fino de la kurso li publikigis sian adreson en E-revuo. Li ricevis leteron de alilanda esperantisto, lia samaĝulo, kiu ankaŭ intencis studi arkitekturon. Preskaŭ senĉese ili korespondis ĝis nun.


Dum la jaroj ili rakontis pri ĉio en sia vivo: pri la studado, pri siaj junulaj aventuroj kaj poste pri sia laboro kaj siaj familioj. Eĉ kelkfoje lia korespondanto invitis Ivan gastigi al li.

La vagonaro haltis. Li elvagoniĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Sur la perono estis nur du personoj, kiuj elvagoniĝis kun li. La stacidomo impresis lin: granda, bela, impona konstruaĵo. Li haltis kaj dum kelkaj minutoj ĝuis ĝin. Li eniris la atendejon – granda hela salono kun multaj malmolaj sidlokoj, pakajlokoj kaj butikoj,

## verkis Vladimir Ĵelev - Ovĉarov, el Bulgario

kiuj vendas gazetojn, librojn kaj memoraĵojn. Li aĉetis urbomapon, sidiĝis sur la proksiman seĝon, metis la sakon sur la pakajlokon kaj malfermis la mapon. Li longe promenis tra la mapo kaj fine trovis la bezonatan straton. Ĝi situis en la preskaŭ sama urboparto. Lia korespondanto rakontadis, ke la urbo estas sufiĉe nova centro de komerco kun grandaj modernaj nuntempaj konstruaĵoj kaj vastaj verdaj bulvaroj kaj stratoj. Li decidis ne uzi transportilon, sed promeni piedmarŝante.

Li marŝis sur vasta bulvarado sub belaj arboj inter modernaj multetaĝaj nuntempaj konstruaĵoj: komercaj centroj, bankoj, diversaj magazenoj. Post iom da tempo li rimarkis, ke la konstruaĵoj estiĝas malpli altaj – kvar-kvinetaĝaj. Kiam li atingis la serĉatan straton, sur ambaŭ ĝiaj flankoj li vidis ordigitajn kiel soldatoj elegantajn duetaĝajn kolorajn domojn. La serĉata de li



domo estis je la fino de la strato – rozkolora konstruaĵo kun vasta marmora ŝtupo antaŭ la enirejo kaj masiva ligna pordo kun feraj ornamaĵoj.

Li sonorigis ĉe la pordo. Post kelkaj minutoj malantaŭ ĝi aŭdiĝis viraj paŝoj. La pordo duonmalfermiĝis kaj montriĝis alta maldika viro kun iomete kalva kapo kaj grandaj, dikaj okulvitroj.

- Kion vi deziras, sinjoro? – seke demandis li.

La alia tuj ekkonis lin. La sama, kiu estis sur la fotoj. Li ridetis kaj gaje diris:

- Saluton, Ĵan. Mi estas Ivan, via bulgara

korespondanto.

La dommastro atente rigardis la nekonaton kaj ankaŭ ekkonis lin. Post mallonga paŭzo li diris same tiel seke:

- Post tri horoj ni ekveturos al la ripozejo.

Ivan estis iom ŝokita kaj ĝeme demandis:

- Ĉu vi ne ricevis mian telegramon?

- Ne.

Ne sciante kion fari, Ivan koncize klarigis pri sia oficvojaĝo kaj pri sia decido resti unun tagon en tiu ĉi urbo por ke ili renkontiĝu.

Ĵan malfermis la pordon, deflankiĝis kaj mane invitis la gaston.

- Bonvolu eniri. Mi montros al vi mian domon.

Ivan eniris en malgrandan antaŭĉambron, lasis sian sakon sur la starantan apud la muro tableton kaj eniris en vastan helan salonon kun multaj bildoj sur la muroj kaj dika tapiŝo sur la planko. De la plafono pendis granda kristala lustro. Meze de la salono estis granda ronda tablo, ĉirkaŭ ĝi malnovstilaj seĝoj.

Ĵan klarigis:

- Ĉi tie ni manĝas kaj akceptas gastojn.

Li montris al la pordo en la kontraŭa flanko:

- Tie estas niaj servejoj kaj tie estas la dormoĉambroj por niaj gastoj.

Poste li montris al la ligna ŝtuparo:

- Supre estas la dormoĉambroj de ni kaj de niaj infanoj.

Sur la muro super la pordo de la dua etaĝo estis granda portreto de Zamenhof. Ĵan turnis sian rigardon al ĝi kaj gaje aldonis:

- La spirito de Zamenhof gardas nin.

Ili eliris sur malferman balkonon kun tablo kaj seĝoj ĉirkaŭ ĝi.

- Kiam la vetero estas bona, ni ĉi tie ripozas kaj trinkas kafon aŭ teon – denove klarigis la dommastro.

Antaŭ la balkono estis vasta korto kovrita de verda herba tapiŝo. Al ĝi gvidis du ŝtupoj de la balkono.

Ŝtona pado tra la korto gvidis al granda naĝbaseno ĉirkaŭita de kelkaj lignaj benkoj.

- Kiam niaj infanoj estis malgrandaj, ni naĝis. Mia edzino ankaŭ nun faras tion zorgante pri sia figuro.

En la maldekstra parto de la korto sur la verdaĵo per malgrandaj blankaj kaj rozkoloraj floretoj estis desegnita granda stelo kun litero E. Montrinte al la stelo Ĵan diris fiere:

- Tiun ĉi stelon mi mem faras ĉiusomere.

Ili revenis en la salonon. Apud la tablo sides virino dorse al ili. Antaŭ ŝi estis du pladoj. Ivan rememoris. Ke li ankoraŭ ne manĝis hodiaŭ kaj ekpensis: “Certe ili invitos min tagmanĝi.”

Ĵan turnis sin al li:

- Mi prezentas al vi mian edzinon.

Poste li turnis sin al ŝi:

- Tio estas mia korespondanto Ivan el Bulgario. Li vizitas nian landon office kaj decidis resti unu tagon en nia urbo por renkonti min.

Ne ĉesante manĝi, per plena buŝo la virino ekparolis ofende en franca lingvo;

- Ĝis kiam vi amindumos tiun ĉi balkanan azenon? Estas tempo adiaŭi lin, ja vi ankoraŭ ne pretigis niajn valizojn.

Ivan ĉi foje estis tute ŝokita. Ĵan silente rigardis al la planko. Ivan proksimiĝis al la tablo.

- Multestimata sinjorino, mi ege bedaŭras, ke mi maltrankviligas vin. Mi pardonpetas – li diris en perfekta franca lingvo- malgraŭ via opinio, ke ni, la bulgaroj, estas balkanaj azenoj. La bulgaroj estas ĝentilaj, bonkoraj, bonanimaj, gastamaj homoj. Mi tre ĝojus, se iam estonte vi kun Ĵan estos niaj karaj gastoj.

Li elpoŝigis malgrandan lignan bele ornamitan boteleton:

- Tio estas natura bulgara roza oleo, mia donaco por vi. Bonvolu akcepti ĝin.

Li metis la boteleton sur la tablon kaj eliris. Ĵan atingis lin en la malgranda salono. Ivan malfermis sian sakon, eligis platan saketon ornamitan per verda stelo kaj surskribo “Bulgario” kaj grandan botelon plenan de flava likvaĵo. Li metis la botelon en la saketon.

- Bonvolu, kara. Tio estas mia donaco al vi, bulgara pruna brando. Mi rakontis al vi pri ĝi. Mi mem produktis ĝin uzante la fruktojn de miaj prunarboj.

Ĵan silente akceptis la botelon. Jam sur la sojlo Ivan levis la manon.

- Adiaŭ, Ĵan. Mi pardonpetas. Mi tre bedaŭras, ke mi ĝenis vian familion.

Post tio la longjara korespondado ĉesis. Longe ambaŭ esperis, ke la alia denove skribos.

verkis kaj sendis **Vladimir Ĵelev - Ovĉarov**  
el Bulgario

**O**ni metis la demandon “kio estas bravulo” kaj mi respondis, ke estas viro sentima, honesta, forta, lerta, riskema, nobla, bonkora. Ĉu, do, tiom granda multo da virtroj en nur unu persono? Mi ne scias, cetere, je la dua demando, ĉu mi renkontis iam, en la reala mondo, viron tian, mi devige konfesis, ke ni eble devus eviti tiajn troajn vortojn!



Nu, mi lasas la vorton “bravulo”, mi iras al la helena kaj internacia “heroo” (ήρωας), kies la unua signifo, en la helena, entenas ĉiujn tiujn karakterizaĵojn kaj multon ankoraŭ. Heroo estas homo, tamen eksterordinara, li posedas super-homajn kapablojn, li estas io inter la mortemuloj kaj la diaĵoj. Plej ofte la dioj favoras, helpas kaj subtenas la heroojn, kiuj post sia morto estas nepre akceptataj en Elizeo (Ηλύσια Πεδία), ia privata paradizo, kie ili ĝuas la eternan feliĉon. Tiajn personojn mi konas multajn. Ili ne vivas en la reala mondo, sed en miaj ŝatataj mitoj. Unu tia heroo estas Perseo.

Iam, reĝo de la potenca urbo-ŝtato de Peloponezo (Πελοπόννησος), Argo (Άργος) estis iu Akrizio (Ακρίσιος). Tiu reĝo havis nur unu filinon, sed ĉar li deziris akiri filojn, li petis orakolon de divenejo, kies respondo estis, ke li ne akiros alian infanon, sed heredanto de lia trono estos, ĉar lia solfilino Danaa (Δανάη), naskos brilan filon, al kiu tamen estas destinite mortigi sian avon.

Aŭskultinte tion, Akrizio, por eviti la fatalon, enŝlosis sian filinon en kelo, en kiu neniu viro povis eniri. Tamen, la virinama direĝo Zeŭso (Ζεὺς), kiu antaŭ longe havis, kiel kutime, ardan pasion al la belega Danaa, alpreninte formon de ora pluvo, eniĝis en la kelon, kuniĝis kun la junulino kaj gravedigis ŝin. Tiele naskiĝis nia heroo, Perseo. Akrizio, dezirante ŝanĝi la destinion, metis sian filinon kaj sian nepon en grandan keston, kiun li ĵetis en la maron. La kesto, mirakle, ne alfundiĝis, ĝi restis sur la supraĵo de la maro, kies ondoj elfetis ĝin sur la bordon de la insulo

Serifo (Σέριφος), unu el la belegaj Cikladoj (Κυκλάδες). La keston trovis sur la marbordo bonkora, malriĉa fiŝisto, nomata Diktiso (Δίκτυς), kiu elliberigis, patrece flegis kaj gastigadis Danaan kaj ŝian bebbon. En Serifo Perseo grandiĝis kaj post kelkaj jaroj, jam bela, forta kaj tre simpatia junulo, estis akceptita de la reĝo de la insulo, Polidekto (Πολυδέκτης), kiu estis jam enamiĝinta al Danaa kaj forte deziris ŝin akiri, tamen li renkontis la neon kaj reziston de la virino. Polidekto, supozante ke la nean sintenon de Danaa kaŭzis la esto de ŝia filo, decidis pereigi lin. Li, do, invitis Perseon kaj minacante lin je la sorto de lia patrino, komisiis al li tre danĝeran mision. Li postulis de la junulo, ke li detranĉu kaj alportu al li la kapon de Gorgono (Γοργόνα).

Gorgono estis terura, eble la plej terura, monstro. Estis ne nur unu, sed tri abomenaj monstroj, tri fratinoj, Stenoa (Σθενώ), Eŭrialala (Ευριάλη) kaj Meduza (Μέδουσα). El tiuj tri monstroj nur Meduza estis mortema, do, ties kapon devis detranĉi Perseo. Tiuj tri estaĵoj, anstataŭ haroj, havis sur la kapo serpentojn, ili havis dentojn similajn al tiuj de apro, manojn kuprajn kaj flugilojn el oro. Oni diris ke ilia aspekto estis terura kaj abomena, sed neniu povis ilin rigardi, ĉar ĉiu estaĵo kiu ilin vidis, tuj ŝtoniĝis.

Perseo devige akceptis la mision, sed tute certa pri sia perejo, estis tute malespera kaj malĝoja, kiam li adiaŭis sian patrinon. Tiam, sin prezentis antaŭ li la dio Hermeso (Ερμής) kaj la diino Atena (Αθηνά), kiu kuraĝigis lin kaj promesis al li helpon. Fakte, la du dioj unue montris al li la vojon al la mistera, nekonata loĝloko de tri aliaj monstraj fratinoj, nomataj Graĵoj (Γραΐαι), tri abomenaj estaĵoj, kies la nomo signifas “maljunulinoj”, pro tio, ke ili estis naskitaj en profunda jam maljuneco. Tiuj tri monstroj posedis kune nur unu komunan okulon kaj unu denton, kiujn ili alterne uzis por ion vidi aŭ manĝi. Ili estis la solaj, kiuj povus indiki la vojon al la loko de la Nimfoj (Νύμφαι), kies helpon nepre bezonis Perseo. Ĉar Graĵoj ne volus lin helpi, laŭ la konsilo de Atena, Perseo ŝtelis la okulon kaj la denton de la monstroj kaj tiel devigis ilin montri al li la vojon al la Nimfoj, el kiuj li ricevis valorajn provizojn. Estis kufo kiu igis lin nevidebla, estis paro da flugaj sandaloj per kiuj li povis moviĝi ne tuŝante la teron kaj



magia sako, la sola en kiu povus esti metita la kapo de Meduza.

Ricevinte ĉion tion ĉi kaj tenante la diamantan falĉilon kiun donis al li Hermeso kaj brilantan kupran ŝildon, flugis super la oceano al la ekstremaĵoj de la nokto, kie estis la restadejo de la Gorgonoj. Tie, portante la kufon, do, nevidate, kaj paŝante sur la aero, do, tute senbrue, li alproksimiĝis kiam la monstroj dormis, kaj rigardante ilin ne rekte, sed pere de la glacea ŝildo, per nur unu fulma, forta bato, detranĉis per la diamanta falĉilo la kapon de Meduza kaj tuj enŝovis ĝin en sian sakon. El la verŝita sango de Meduza tuj naskiĝis la fluganta ĉevalo, Pegazo (Πήγασος), tamen Perseo ne haltis, rapidege forflugis, persekutite de la terure ŝrikantaj du ceteraj Gorgonoj, kiuj tamen povis nek vidi nek aŭdi lin. Perseo flugis super Afriko, kaj oni diras, ke ĉar el lia sako falis sur ĝin kelkaj gutoj de la sango de Meduza, en la kontinento aperis abundo da sovaĝaj bestoj.

Fine, Perseo atingis Etiopujon, kie, en marborda loko, ekvidis strangan scenon, belegan junulinon, kiu estis ligita sur roko, kaj forlasita en dezerta loko, tre proksime al la maro. Li alproksimiĝis kaj tuj sentis sin trafita de la sagoj de Eroso (Έρως). Li mirakle eke enamiĝis al la belega junulino, kiun li malligis kaj ŝin metis sub sia protekto. Li informiĝis ke ŝi estas Andromeda (Ανδρομέδα), la filino de la reĝo Cefeo (Κηφεύς).

Senvole kulpa pri la malfeliĉo de Andromeda estis ŝia patrino Kasiopea (Κασσιόπη), kiu, tre fiero pro la beleco de sia solfilino, arogante fanfaronadis, ke la reĝidino estas pli bela ol la Nereidinoj (Νηρηίδες) mem. La maraj duondiinoj, kolerinte pro la ofendo petis de Pozidono (Ποσειδών), ke li punu la reĝinon, tial, la dio sendis al la lando maran monstron, kiu komencis ataki kaj mortigi la fiŝistojn, kaŭzi nelimitajn damaĝojn al homoj kaj vilaĝoj. Cefeo, ne sciante kion fari por eviti la katastrofon, petis konsilon de divenejo, el kiu venis terura dia orakolo, laŭ kiu, li devis oferi, kiel nutraĵon al la monstro, Andromedan mem. Cefeo ne povis obei al tia postulo, tamen la popolo, kiu ne plu povis toleri la daŭran malfeliĉon, kiun kaŭzis la monstro, ribele devigis la reĝon cedi kaj obei al la orakolo. Perseo, postulante kiel rekompenco la manon de la reĝidino, prenis sur sin la taskon alfronti la monstron, kaj, fakte, portante siajn flugajn sandalojn, per la diamanta falĉilo, povis facile mortigi la monstron kaj elliberigi la landon. Li edziĝis kun Andromeda, el kiu post nelonge li akiris sian unuan filon, Person (Πέρσης). Pasis kelka trankvila kaj feliĉa tempo, tamen Perseo devis reveni ĉe sia patrino, do, li lasis Person al sia bopatro kaj foriris. Tiu Perso iĝis kronprinco kaj poste reĝo de la lando kaj li

estas la gentopatro de la Persoj.

Perseo atingis Serifon, kie lia malamiko, Polidekto, kiu tenis Danaan enŝlosita en la palaco, provis lin aresti kaj mortigi. Tiam, Perseo montrinte al li kaj al ties fideluloj la kapon de Meduza, ilin ŝtonigis kaj iĝis mastro de la insulo. Post tio, li donis la donacojn de la Nimfoj al Hermeso kaj liveris la kapon de Meduza al Atena, kiu ĝin metis sur sia ŝildo. Fine, li liveris la regadon de Serifo al la justa kaj honesta Diktiso kaj kun sia patrino kaj sia edzino li foriris al Argo. Tamen, tie ne plu estis reĝo lia avo Akrizio, sed ties frato Prito (Προίτος), kiu estis uzurpinta la tronon kaj forpelinta la reĝon. Perseo facile venkis kaj mortigis la uzurpinton kaj poste iris al Lariso (Λάρισσα), kie estis rifuĝinta lia avo, li renkontis lin kaj klopodis konvinki lin ne timi la orakolon kaj reveni al la patrujo. Akrizio konvinkiĝis kaj estis feliĉa, ĉar li ekkonis sian heroan nepon. Honore al tio, la loka reĝo organizis feston kaj atletajn ludojn, kiujn partoprenis ankaŭ Perseo. Tamen, kiam la heroo ĵetis la ŝtonon, ĝi, mirinde, ŝanĝis direkton, ĝi falis sur Akrizion kaj lin mortigis. La fatalo ankoraŭfoje elmontriĝis neevitebla, Perseo, senvole iĝis mortiginto de sia avo, ĉar tio estis destinita de la dioj, esprimita per certa orakolo.

La heroo revenis al Argo sed li ne povis sidi sur la trono de sia mortigita avo. Li, do, interkonsentis kun Megapento (Μεγαπένθης), la filo de Prito kaj reĝo de Tirinso (Τίρυνς), kaj ili interŝanĝis siajn reĝejoj, Megapento iĝis reĝo de Argo kaj Perseo reĝo de Tirinso, kie, pli poste, li fondis la majestatan, potencan kaj gloran urbo-ŝtaton Miceno (Μυκήναι).

Perseo vivis en gloro kaj feliĉo. Kun Andromeda akiris unu filinon kaj ses filojn, kies posteuloj estis gloraj herooj de la brila helena mondo.

Tia estis la aventura surmonda vivo de Perseo, kiu ripozas en Elizeo, en la postmorta paradizo de la herooj. Tamen, li estas samtempe sur la ĉielo, videbla konstelacio, kaj tie li ne estas sola, apud li estas, en formo de la astronomia fantazio, ankaŭ konstelacioj, lia kara edzino, lia sola amdonantino, Andromeda, kaj aliaj protagonistoj de tiu ĉi nia historio, Kasiopea, Cefeo, Pegazo.

Jes, ĉio mita vivas eterne, jen en la fantazio de la iluziigintoj, jen sur la ĉielo!

## “GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO”

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo



## La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 4)

sendis R. Platteau, el Francio

**E**lian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuarkikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : [\\*http://katalogo.uea.org/?inf=9437](http://katalogo.uea.org/?inf=9437)

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957. Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

### NAJTINGALO (rakonto n° 207 p. 290-291)



Unu najtingalo estis konstruinta sian neston en heĝo el kratagoj, apud provenca farmbiena domo. Iutage juna legomkultivisto, kiu konjekteble volis kontroli sian lertecon, lanĉis ŝtonon al la inbirdo, en la momento kiam ŝi eligis el la nesto, kaj rompis al ŝi la du kruojn. Baldaŭ, kaptita de kulposento, kaj bedaŭrante sian senpripenson, li levis la viktimon kaj,

ne aŭdacante finmortigi ŝin, li iris remeti ŝin sur ŝiajn ovojn.

Je la morgaŭa tago, scivolema pri ekscii, kiuj estis la konsekvencoj de sia ago, li rigardegis la kratagheĝon, kaj vidis la virbirdon demeti vermeton surrante de l'nesto, kontraŭ sia inbirdo lama, kiu suferanta siajn dolorojn, aspektis ne atenti tiun agon aman. La najtingalo ripetis plurfoje tiun faron; la vermo vivanta glitadis el la rando de l'nesto, sed estis tuj kolektata de la virbirdo maltrankviliĝanta, kiu klopodis ĝin prezenti denove al sia kunulino. Li iradis, kaj venadis, malleviĝis, kaj leviĝis, haltis dum momento sur la rando de l'ŝirmejo, kaj havis ne plu da ripozo.

Nokto alvenis, sed male al la antaŭa, neniom da kanto, neniom da ruladoj.

La morgaŭan matenon, la kovantino estis mortiĝinta. La masklo, sidanta al branĉo tutapude, restis senmova; li faris, kiel provencaj kamparanoj nomis tion la «paume», kaj certe, oni povus preni ĝin per la mano.

Kio okazis en la menso de l'virnajtingalo, kiu vidis sian femalon malsana, ĝis grado, ke ŝi ne povis interesiĝi pri nutro, kaj kiu ŝin alportis ĝin, ĝin metis kontraŭ la bekon tiamaniere, ke ŝi nur bezonus klini sin por ĝin preni ? Ne plu temas ĉi tie pri la ptra instinkto, kiu pelas la patron al enbeki siajn birdidijon tro malfortaj por serĉi mem manĝon. Tio estas eble, kiel kelkaj diros, la natura instinkto. Sed la okazo estas malsama, tio estas estaĵo, persono, kiu helpas al sia similulo, kiun akcidenton farigis lama. La kono pri ties situacio ne povis esti montrita al li alie ol per rezono.

sendis **Roland Platteau**, el Francio



## Hungaraj nekonataj verkistoj kaj poetoj

**P**ere de Esperanto la mondo jam ekkonis multajn hungarajn verkistojn kaj poetojn, kiuj pliriĉigis la mondliteraturon. Bedaŭrinde estas kelkaj hungaraj verkistoj kaj poetoj pri kiu oni scias preskaŭ nenion. Kvankam liaj verkaĵoj meritis, se oni sciiĝus pri ili ankaŭ en Esperantujo. En la estonto mi planas prezenti ilin kaj forigi de sur ili la nigran vualon per kio iliaj malamikoj volis malpurigi ilin kaj iliajn verkaĵojn.

La unua estas mia ŝatata verkisto Wass Albert. Pri li ofte la malamikoj mise asertas, ke li estis faŝisto, eĉ militokrimulo. Kompreneble tiu ĉi ne estas vera. Kiu diras pri li similajn, tiuj scias nenion pri Wass. Ili ne legis liajn verkaĵojn. Mi planas traduki liajn kelkajn novelojn, fabelojn, rakontojn por ke mi pruvu la

## tradukis Apáti Kovács Béla, el Hungario

grandecon de Wass Albert.

Nun kelkvorte pri lia vivo:

Wass Albert naskiĝis la 8-an de januaro 1908 kaj li mortis la 17-an de februaro 1998.

Ĝis 1944 li vivis en Transilvanio kaj bone konis la vivon de la tieaj homoj. Post la dua mondmilito li vivis en Germanio kaj de 1952 en Usono en Florido.

Eble lia plej konata libro estas "Glavo kaj falĉilo". Kompreneble inter la multaj verkaĵoj, kiujn Wass Albert donacis al la hungaraj homoj estas malfacile elekti la plej bonan.

En Hungario dum la socialisma reĝimo li estis





ekzilata verkisto kaj neniam kaj nenie aperis la libroj de Wass, eĉ estis malpermesite paroli kaj skribi pri li. Bedaŭrinde ankaŭ nun oni ofte atakas lin maljuste, ĉar li devenis el nobla familio.

Laŭ mi alvenis la tempo, ekkoni lian nomon ankaŭ en Esperantujo.

**Apáti Kovács Béla**, el Hungario

## La patrujkonkero de la ranoj

-- Instruflena fabelo por junaj hungaroj de **Albert Wass**



La domo de la homo tie staris sur la monto kaj ĝi regis. Ĝi regis la ĝardenon, arbojn, arbustojn kaj la legomojn. Ĝi regis la plugkampojn, kampojn, kaj paŝtejojn, kaj ĝi regis ankaŭ la arbaron kiu komenciĝis malantaŭ la monteto kaj ĝi etendiĝis supren ĝis la monto. La arbojn

donis fruktojn, kaj ilin rikoltis por vintro la homo, kiu vivis en la domo. Li kolektis la legomojn kaj li metis ilin en la kelon por ke ili ne frostiĝu. Li kolektis la grenon de sur la plugkampoj, de sur la kampoj la fojnon kaj el la arbaro la brullignon. Li ĉion aranĝis en la domo, tiel, kiel tio estas la plej bona. Komence de la vintro de sur la paŝtejo li enigis siajn bestojn, en la varmajn stalojn li donis por ili hejmon, kaj li zorgis pri ili. Tiel vivis la homo.

Ankoraŭ oni devas scii, ke sur la kamentubo de la domo staradis cikonioj de printempo ĝis aŭtuno, kaj sub la defluilo unu paro da hirundoj nestis. Oni devas scii, printempe laodoro de la burĝonantaj betuloj ĉirkaŭis la domon, kaj somere birdokantado kaj multe da floroj.

La domo havis grandajn, fortajn murojn, kaj la homo kalkis ilin je blanka unufoje en ĉiu jaro, escepte tie, kie hundorozo grimpis sur ĝi. Ĉi hundorozo floris de la mezo de junio, kaj tiam tra la larĝe malfermita odoroto rentis en la ĉambron.

Tiel vivis la domo kaj en ĝi la homo. En iu nebuleca tago, kiam la pluvo pendis per ŝnuro el la ĉielo, de ie du grizaj, malsekaj ranetoj alvenis. Ili venis de malproksimo, ili malvarmis kaj ili estis malsekaj. Ili ekvidis la domon, ili traglitis tra la malfermita pordo kaj ili kaŝiĝis en la kelon. Ili trovis abunde nutraĵon, ili

satiĝis kaj baldaŭe ili komencis dikiĝi. La junaj ranoj, kiuj tie kreskiĝis ili jam fartis hejmece en la domo, kaj tiel ili kuradis en la kelo, kvazaŭ ĝi havus ilia propraĵo.

Komence la homo eĉ ne vidis ilin. Poste li rimarkis, ke io manĝas la kreskaĵon, sed tio ne interesis lin. Li havis sufiĉe da produktaĵoj. Kiu estas malsatanto, tiu ricevis el ĝi. En iu tago li ekvidis ranon kuranta preter la muro. Kiom eta ĝi estas kaj kiom timema ĝi estas – li pensis. Do ĝi vivu, se ĝi deziras.

Kaj pasis la tempo, la ranoj multobliĝis. Unue ili serĉosis la kelon. Poste ili trafosis la murojn. Ili boris kurbajn, profundajn truojn en ĝi ĉie, kaj ili jam atingis ankaŭ la ĉambrojn foje – foje. La homo svingadis sian kapon ekvidante la unuan ranotruon en sia ĉambro. Kaj ĉar li ŝatis la ordon, li ŝtopis kaj kalkis la aperturon. En alia tago matene denove tie ĝi estis. La homo trifoje unu post la alia ŝtopis ĝin, kaj la ranoj boris ĝin trifoje unu post la alia denove. Tiam la homo mansvingis kaj li pensis tion:

– Ankaŭ ili devas vivi. Se ili fartas bone tiel, tiam estus ilia deziro!

Ekde tio li ne ŝtopis plurfoje la truojn. La ranoj multobliĝis plu rapide kaj ankaŭ la truoj multobliĝis en la muro de la domo. Ili jam ŝteliris ne nur en la kelon, sed en la kameron, subtegmenton, eĉ nokte ankaŭ en la ĉambrojn kaj ili voris ĉion, kio estis vorebla. En iu tago, kiam ili komencis vori lian festajn botojn, la homo koleriĝis, kaj li batis al ili per sia hakileto. La kapon de iu rano estis trafita per ĝi kaj tiu mortis. La ranoj ege insultiĝante furiozis. Ili tuj manifestis, ke la homo estas malamiko, kiu ne lasas vivi ilin, li limigas ilian liberecon, li ignoras iliajn rajtojn, li estas murdisto, malica kaj egoista.

– Ni ne estos liaj sklavoj plu! – kriegis la ĉefrano de sur grasujo. – Ni devigas nian liberecon kaj rajtojn. – La ranoj decidis komenci batalon kontraŭ la homo. Pri tio ĉi la homo sciis nenion. Li forgesis baldaŭe sian koleron, li aĉetis aliajn festajn botojn, kaj lin ne interesis plu la ranoj. Kvankam tiam jam ili estis multege. Ili elmanĝis ĉiom da legomoj en la kelo, ĉiom da faruno kaj ĉiom da fromaĝoj en la kamero, eĉ ili komencis maĝi ankaŭ lardon, kvankam ili sciis, ĝi estis la plej valora trezoro de la homo, el kio li ne donas al sia hundo.

Kiam tion la homo rimarkis, li prenis la restintan lardon, li ligis ĝin al bastono kaj la bastono pere de drato plendigis al trabo. El ĝi fariĝis vera indigno inter la ranoj. – Fiago, malgloro! – Ili kriegadis, kiam ili eksciis, ke ili ne povas atingi ĝin. – Li forrabis nian nutraĵon, li prirabas kaj ekspluatas nin. Ni ne toleras plu! – Ili ekribelis. – Al ni apartenas la domo. – Ili proklamis tion ĉi. – Ĉiam ĝi apartenis al ni. Ni nur toleris la homon en ĝi, ĝis li bone kondukis. Sed nun

jam sufiĉas!

En iu nokto, kiam li dormis ili atakis kaj mordadis lin, eĉ ili pelis kaj persekutis malproksimen, poste ili fiere manifestis al la ĝardeno, al la arboj, al la bestoj kaj birdoj, eĉ ankaŭ al la floroj – en la estonto la domo ne apartenos plu al homolando, se dal ranolando laŭ rajtok aj leĝo. Kaj ili ekregis ranomaniero. Ĉion ili elmanĝegis, kio estas manĝebla kaj ĉion ili maĉis, kio ne estis manĝebla, sed ĝi estis antaŭ iliaj okuloj. Malpleniĝis tute la kelo, la kamero kaj la grenejo. La birdoj forflugis, velkis la floroj, la muroj de la domo ekkadukiĝis kaj ili fariĝis nigraj, la odoron de la arboj kaj la floroj ŝanĝis je odoraĉo. La legomoj pereigis en la tero, ĉar neniu rikoltis ilin. La fruktoj maturiĝis falinte surteren putriĝis. La greno estis ne rikoltita, ĝi eliĝis el la kampo kaj la vento eligis la semojn. Vintro alvenis, ĝis tiam la ranoj manĝis ĉion, kio estis manĝebla kaj ili maĉis ĉion, kio ne estis manĝebla. La muroj estas plenplenaj de truoj, de sur la tegmento falis la tegoloj, sub la fenestroj kaj pordoj faŭkis kolosaj truoj. Kaj tiam ili komencis malsati, ĉar ne estis eĉ unu semo da

greno, kaj tra la fendoj de la pordoj, krome tra la truetoj enblovegis la vento, tra la kaduka tegmento enfalis la neĝo, kaj ili ne povis helpi sin.

Unue ili komencis kvereli, ili mordis, murdis unu la alian, ili maĉis, manĝis unu la alian, sed fine por ili restis nur la foriro kaj ili forlasis la ruinigitan imperion.

Printempe la homo denove revenis orde, li renovigis la tegmenton, li purigis la domon, li riparigis kaj klakis la murojn, li plugis la kampon, li semis kaj plantis. Je somero denove florodoro kaj birdotrilado ĉirkaŭis la domon. Je aŭtuno la kelo, la kamero kaj la grenejo denove pleniĝis kaj kiam alvenis vintro, jam ĉio estis tiel, kvazaŭ nenio estus okazinta.

Sed kelkaj ranoj tamen kaŝiĝis en la muroj aŭ en la kavoj de la kelo. Kaj kiam la homo rimarkis, ke ili denove komencas multobliĝi, longe li cerbumis, kio okazu al ili.

Ankaŭ vi cerbumu kaj agu laŭ tio.

tradukis: **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

## El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (22)

### DUA PARTO - LA VIVO

#### 42

TAŬO faris la unuecan.  
La unueca la duecan.  
La dueca la triecan.  
La trieca ĉiujn aĵojn.  
Ĉiuj aĵoj havas dorse la malhelan  
kaj strebas al lumo,  
kaj la fluanta forto donas al ili harmonion.

Kion homoj malamas,  
tio estas esti forlasito, solulo, senindulo.  
Kaj tamen princoj kaj reĝoj elektas  
la vortojn por nomi sin tiel.  
Ĉar la aĵoj aŭ pliiĝas per malplimultigo  
aŭ malpliiĝas per plimultigo.  
Kion aliaj instruas, tion ankaŭ mi instruas:  
"La fortuloj ne mortas laŭ natura morto."  
Tion mi volas fari elirpunkto de mia instruo.

#### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

"Ĉiuj aĵoj havas dorse la malhelan kaj strebas al lumo"  
La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:  
"La miriadoj da estaĵoj entenas en si la jinon kaj la jangon  
kiel du kontraŭajn fortojn."



#### Rimarko de Cezar

Estas do pli verŝajne, ke Laocio tiurilate celis la duecon de la aĵoj, kaj ne certan naskon el kosma malhelo, kiel supozas verŝajne Vilhelmo.

#### 43

La plej mola sur la Tero  
preterpasas la plej duran surtere.  
La neekzistanta penetras eĉ en tion,  
kio ne havas interspacon.  
Je tio oni ekkonas la valoron de la senagado.  
La instruadon sen vortoj, la valoron de la  
senagado  
atingas nur malmultaj surtere.

#### Rimarkoj de Anniespera

Wang Chongfang tradukis la du unuajn liniojn tiel:  
"Tio, kio estas la plej mola sub la Ĉielo(1),  
Povas galopi tra tio, kio estas la plej malmola(2);"  
1 T.e. la akvo.  
2 Ekz. la roko.

(daŭrigota)

## Rakonto de Adil Olluri, Albanujo

**A**vni estis tipo ne scianta facile ĝojiĝi, nek malĝojiĝi, eĉ pro iu vorto, estante unu el la plej prudentaj knaboj inter siaj amikoj. Li ne estis kelkiu multe fortimanta, nek unu el tiuj kiuj orgojlas pro faritaj aŭ nefaritaj bravaĵoj, kiel ja faris multaj el siaj sambatalantoj. Li simple plenumis sian taskon, tiel kiel ordonis lin la superuloj. Tian soldaton aspirus havi al si ĉiu militgvidanto.

Li, dum tiuj du jaroj de la jarcentofino, estis vundita dufoje, eĉ, la duan fojon, nur gracila linio dividis lin de la morto, ne postlasinta vivsignojn, longajn minutojn. Ĉar oni apenaŭ rimarkis ke li enspiris, liaj kamaradoj estis findecidintaj entombigi lin la morgaŭon, je altaj honoroj, dediĉe al martiro por la libero. Eĉ la brigadestro estis jam kompilinta la omaĝparoladon, glorigante sian batalanton. Kaj en la momenteto kiam



ili levis lian korpon por enmeti ĝin en la ĉerkon, okazis la miraklo kaj li ekmovis la manojn kaj eklanĉis tondron da nekompreneblaj vortoj. La soldatojn komence trafis paniko kaj ili rigardadis unu la alian mirmaniere, sed kiam Avni komencis ripetadi siajn viglaĵojn, la vizaĝo de la soldatoj ekridis kaj ili ekgajiĝis, ĉar ilia kamarado estis plu ĉe la vivuloj.

Post kompleta resaniĝo, ili ariĝis por festi lian resurekton, trinkante kaj kantante ĝis la malfruaj horoj. Por tiu festo ili havis plian motivon fortan, ĉar la aliancanoj estis enirintaj nian landon kaj la serbaj trupoj estis retiriĝantaj. La serboj, forirante, tutan tempon tenis la kapon turnita, neniumomente levante la blankan flagon, kiel tion faras kutime ĉiu venkita armeo. Kvankam tiutage estis varmega somera vetero kaj la naturo denove brilis, la suno disigis la fumnebulon, ĉe la fuĝintoj rimarkiĝis pala ombro survizaĝe kaj ili aspektis kvazaŭ frostiĝintaj, mornaj kaj plenaj je kolero.

Estis la deka tago de junio kaj Avni kun la aliaj

junuloj faris preparojn por ke kune, marŝante, ili aliru en la pli proksiman urbeton, unu el la plej malgrandaj en nia lando. Kiam ili alproksimiĝis malpli ol ducent metrojn, ili konstatis ke ĝi estis tute ruinigita, postrestis nur ĝia skeleto. Avni rigardadis kompate la detruitan urbeton, vepensante pri tio trafinta tiun lokon. Ĉi tie li pasigis la plej belajn jarojn de sia junaĝo. Li deziris promeni nostalgie en la urbeto, piediri tra ĉiu kvartalo, strato kaj strateto ĝia, rememori unu post unu la neforgeseblan tempon pasigitan en ĝi, kie li malĉeestis lastajn du jarojn.

Tial, kiam li starigis sian deziron al sia superulo por ĉirkaŭviziti tiun malgrandan lokon, la superulo sciigis al li novaĵon ne tiel agrablan en tiu momento, ke la urbeto ankoraŭ ne estis tute liberigita, pro tio oni devus esti atentema, ĉar ankoraŭ ekzistas etaj grupoj ne eskapintaj, cirkulantaj kvazaŭ senkapaj kokinoj tra la kvartaloj de la lokaj serboj, senuniforme, sed armitaj, por defendi la ŝtaton, kiu ne kunprenis ilin kiam ĝi forkuris, sed nur instigis ilin pludefendi ĉi-landon, dirante ke ĝi estis ilia kaj de neniu alia.

- Hieraŭ mi sciigis de certaj fontoj ke ili kunvenis ĉe la domo de Dragutin Spasojeviĉ aŭ ie apude- informis konvinkite siajn subulojn la gvidanto de tiu marŝtrupo, ke krom la celon por ĝisliberigi la urbeton, oni intencis ankaŭ la starigon de la nova ŝtatpotenco sur ĝi.

Avni, ĵus aŭdinte la familian nomon Spasojeviĉ, tutkorpe embarasiĝis kaj eksentis tremon de la kapo ĝis la piedoj, ĉar kun tiu familio je tia nomo li havis parencecon, kion li ne estis sciiginta al iu ajn. Tiun ŝanĝiĝon de lia mieno apenaŭ rimarkis iu el 47 marŝantoj, venkeme enirantaj en la urbon, kiuj, malgraŭ ties laceco kaj elĉerpiteco, nerazitaj kaj nelavitaj, eniris tiel solene kaj ceremonie, kiel tio indus nur al venkintoj.

- Hodiaŭ posttagmeze, pli precize je la kvara horo, ni devas sieĝi Spasojeviĉojn kaj tutan ilian kvartalon. Ni devas senarmigi kaj aresti tiujn banditojn- decideme ordonis la ĉefmarŝanto kaj ĉiuj aprobis tion, helpante la ĉefon per ideoj por ĝiskompili la sieĝplanon de la domo per detaloj, kies sukcesplena plenumiĝo, signifos kompletan saviĝon de la urbeto. Nur unu el la marŝantoj silentis, staris enpenŝiĝinta, irrevenis de unu loko al alia, sed ankaŭ nun la venkintoj ne rimarkis la signojn montrantajn ke ĉe Avni rompiĝis la ekvilibro.

Li senĉese pensis pri Vesna, la sola filino de Spasojeviĉoj, kiu estis lia unua amo dum la mezlernejaj jaroj, tamen ne nur la unua, sed ankaŭ la



sola, ĉar, post la fino de la studoj en la mezlernejo la milito komenciĝis kaj li estis enviciĝinta ĉe la sojlodefendantoj. Vesna, blondulino kurthara, estis samaĝa al Avni. Ino tre altstatura por sia aĝo, kutime vestita per malvastaj ĝinzoj, distingantaj la korpoliniojn kaj lasantaj senmense la albanan junulon.

Ili renkontiĝis apud la ortodoksa preĝejo de la urbeto. Proksime estis kampo kiun la junuloj transformis en malgrandan futbalejon, kie, pro manko de kolonoj, la golpordoj anstataŭiĝis foje per ŝtonoj, foje per librotekoj. Avni, almenaŭ dufoje semajne rigardadis ĉi tiun knabinon apud la preĝejo. Estis li erotike ekscitita al ŝi, ĝis tiu grado ke neniu alia knabino interesis al li. Sed lia embaraso estis nescii la serban, tiel li ne scipovis kiel esprimi sian amon al ŝi kaj estingi sian suferafon.

Tio daŭris ĝiskiam la instruisto de la albana lingvo, Kujtim Kastrati, relative junaĝa, helpis lin skribante amleteron, kiun Avni ankoraŭ parkeris vortvorte:

*"Volim te. Mnogo te volim. Bez tebe moj život ništa ne vredi. Poljubi me samo jednom, ja ĉu zauvek biti tvoj." <sup>1</sup>*

Avni finfine kuraĝis alfronti la knabinon, ĉar nun li disponis pri certeco kaj rimedo per kiu li povos komunikiĝi. Vesna, tiutage, hastis por hejmeniri, ĉar estis pluvnuboj en la ĉielo kaj de momenteto al momenteto oni atendis pluvon, kiam surprize kaj neatendite, li troviĝis antaŭ ŝin kaj elvolvis la leteron kaj etendis ĝin al Vesna, leteron kies vortoj estis horizontale vicigitaj kaj skribitaj per krajono Marker kaj ruĝkoloraj grandaj literoj. Vesna komence ekridegis pro tiu ago de la junulo, korvohara, nigraokula kaj korp-evoluinta.

Ŝi ne ridis tiom pro la skribitaj vortoj kiom pro la fakto ke la albana junulo ne scipovis diri ion pli ol tiuj vortoj en la letero. Li simple estis konfuzita, ne sciante kion fari, eĉ unufoje li ekpensis ke la instruisto estis skribinta ion, kio igis lin kvazaŭ klaŭnon antaŭ ŝi, senigante lin de ajna ebleco por ame ekrilati kun la bela Vesna. Sed, post kelkaj tagoj, ŝi mem alproksimiĝis al Avni, ĉar konsideris lian akompanion ege amuza. Ŝi ĉiutage lernigis al li novan serban vorton.

Ĉi kozojn li rememoris tiun tagon de la deka de junio, neniam forgesante la unuan kison kun Vesna malantaŭ la preĝeja muro, same la unuan amoron kun ŝi en la eta monto ĉepiede de la urbeto. Li rememoris Vesnan iranta, vestita per ĉielkoloraj kaj nigraj ĝinzoj, rememoris sian nudan korpon, siajn malgrandajn mamojn, la solajn kiujn li estis vidintaj iafoje. Soliĝinte kun ĉi tiuj pensoj, li sentis sin povrulo, hontema, ĉar li

devis partopreni en la agado de la atako kontraŭ la domon de sia sola amantino. En tiuj momentetoj li ekmalamis sin, ankaŭ la uniformon, kiun li portis surkorpe, kiun li plenvole survestis, ĉar la serbaj policistoj estis mortigintaj sian onklon, al kiu li rilatis pli forte ol al sia patro.

Alvenis la kvara horo kaj la domo de Spasojeviĉo sieĝatis. Ŝtormo da kugloj estis alĵetata sur ĝin kaj sur ĝiajn murojn kiuj plentruigis pro ili. La rezistado de la familianoj kaj kvartalaj viroj, enfermitaj en la domo, daŭris nur duonhoron, kaj ili, unu post la alia, enmaniĝis ĉiuj, komencante de Dragutin, liaj filoj, najbaroj kaj laste de lia sola filino, bela Vesna. Vidinte ŝin, Avni eksentis dolorigan kaj senkonscian angoron, alproksimiĝis al la unua vico de la soldatoj, ĝuste al ties gvidanto, Ahmet, nur por vidi Vesnan pli apude kaj pli klare. Ankaŭ Vesna vidis lin kaj alrigardis rekte al liaj okuloj, sed ĉi tiu neniam komprenis, ĉu tiu rigardo esprimis amon aŭ malamon en tiuj momentetoj de kaptiteco.

Li sentis sin tre emociigita kaj hontigita samtempe. Vesna en liaj okuloj estis la sama, lia adorantino, kaj li faros ĉion por ankoraŭfoje aŭskulti ŝian ridon. Estis la sama, belulino, flirtulino, kvankam la timo estis paliginta iomete la ties brilon.

- *Euu, bona vagino do estas, freŝfreŝa ŝkina* <sup>2</sup> - sin esprimis Ahmet, kio deekstere ŝajnis kiel hazarda humoro, igante la ceterajn soldatojn ekridi, sed en lia interno, li esprimis volupton al Vesna, kies korpon li senvestigis pense kaj okule.

- Jam alvenis la tago por venĝi por ĉiuj niaj fratinoj seksperfortitaj de ĉi tiuj fiuloj- aldonis li decideme, klarigante al la soldatoj ke tiu knabino apartenas al li mem, estis ja lia ĉasaĵo.

- Tiun knabinon neblas tuŝi eĉ per la fingreto- tuj reagis kiel neniam antaŭe la plej juna soldato inter ili.

- Kion vi diras, do?!- alparolis Ahmet malestime al Avni.

- Oni neniam povas tuŝi ŝin. Estas la mia- diris Avni per mallaŭta voĉo. Tiel decidema li ŝajnis, kiel ankaŭ ruĝiĝinta pro honto, kio igis la komandanton ekridi, same la soldatojn proksime al ili.

- Ne gravas, mi lasos ŝin ankaŭ al vi, iam - diris Ahmet, kvazaŭ dezirante konsoli al sia subulo, kiu, post ĉi tiuj vortoj, ne plu toleris sed aldirektis sian kalaŝnikovon al sia superulo, surmetante la tubon de la malnova sovetia armilo sur la brusto de Ahmet.

- Neniu kuraĝu ektuŝi ĉi tiun virinon, antaŭ ol piedpremi mian mortontan korpon, - severe minacis Avni, ankoraŭ pli skuiĝanta, vidinte Vesnan ekplori. Ŝi certe estis kompreninta ke ĉi tiun memoferon li estis faranta por ŝi kaj nur por ŝi, sed pro timo, tiel pro la soldatoj sieĝantaj, kiel pro siaj kruelaj familianoj, ne

kuraĝis alvoki lin laŭnome.

- Tia masklo estas ja vi?! Pro ŝkina vi volas mortigi vian komandanton, ĉu?! Ptu, mi fiku merdan dezertinton - kaj post ĉi tiuj vortoj de ilia gvidanto, ĉiuj soldatoj kvazaŭ histeria ĥoro, komencis ofendi Avnin, nomante lin dezertinto, unu post la alia.

- Dum ili pafis per ofendaj vortosagoj al la povra junulo, kiu neniumomente demetis la malvarman tubon de la armilo tuŝanta la bruston de sia komandanto, grupo de dekoj da fremdaj soldatoj, parolintaj foje malbonan anglan kaj foje apartan lingvon, akompanate de bruado de tanko kaj aliaj

militveturiloj, eniris la pordojn de la domo de Spasojeviĉoj.

<sup>1</sup> "Mi amas vin. Mi ege amas vin. Sen vi mia vivo nenion valoras. Donu min nur unu kison kaj mi estos la via poreterne."

<sup>2</sup> Mokvorto por serboj fare de albanoj.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

## Esperantistaj cigaredoj



Turkaj Cigaredoj Esperanto  
Sola Liveranto del' Esperantistaj Societoj.  
Artoplene per la mano perparitaj.  
Kun la plej elektita Turka Tabako.

Trade Mark  
**K.Em.Kiriakidis kaj Filo**  
**Samos – Turkujo**

Samoso insulo en la Egea maro, ĉirkaŭ la jaro 1910, kiam ĝi estis aŭtonoma sed sub la hegemonio de Turkujo aŭ la tiama Osmana Imperio, ne nur estis la unua landparto de la mondo, kie la internacia lingvo Esperanto estis instruita leĝe en la lernejoj, kiel deviga

leciono, sed ankaŭ estis la unua kaj nura landparto de la mondo kie oni produktis esperantajn cigaredojn.

**T**urkaj verdstelaj Esperantistaj Cigaredoj tutmonde konataj, fumiĝataj kaj preferataj de la Esperantistaro. Solaj provizantoj de la Esperantistaj grupoj, **K. Em. Kiriakidis & Filo**, (Samos, Azia Turkolando). Petu prezaron de ni aŭ de nia ĉefvendisto por Germanujo: **Sro Th. Anding, Berlin SW. 48.**

## Nia Bela Tero

ЕЛЕНА ПОПОВА  
**ЗЕМЯТА НИ ХУБАВА**



ELENA POPOVA  
**NIA BELA TERO**

Aperis la libro de Elena Popova el Bulgario: "**Nia Bela Tero**". Jen recenzo de Hori Jasuo el Japanio pri la libro:

*Sendita al mi estas la poemaro "Nia bela tero" en Esperanto kaj la bulgara lingvo versita de Elena Popova, sumoo-istino aĝulino. La libro konsistas el du partoj: "Nia bela tero" kaj "Animala bunta mondo".*

*Legante la unuan parton mi povis senti delikatajn movojn de la naturo en Bulgario, ekzemple gutoj, rosoj, folioj, pluveto, riveretoj ktp, kiuj ŝanĝas sin laŭ la transiro de la sezono. Leginte la poemon, infanoj iru al la najbara arbareto por tuŝi mem tiujn naturajojn. Estas pli grave por infanoj ami tiujn naturajn aferon, ol uzi komputilan ludon.*

*En la dua parto aperas diversaj animaloj. Ili aperas komike, malgaje, satire...*

*Mi rekomendas, ke vi legu la poemojn en la maja sumoo.*

**HORI Jasuo**



## Ŝercoj



La malsanulo demandas la okulkuraciston:  
— Sinjoro doktoro, ĉu manĝante karoton miaj okuloj resaniĝos?  
— Certe sinjoro. Ĉu vi jam vidis okulvitran leporon?

\*\*\*

Viro deziras baniĝi ĉe la golfo de Nilo. Li senvestiĝas kaj dume li demandas lokanon:  
— Bonvolu diri, ĉu ĉi tie estas ŝarkoj?  
— Ĉi tie ne estas ŝarkoj – respondas la lokano.  
La viro jam estas preta ensalti la riveron, sed ankoraŭfoje li demandas por trankciligis sin:  
— Ĉu vi ĵuras, ke ĉi tie ne estas ŝarkoj?  
— Jes, mi ĵuras, ĉar la ŝarkoj timas de la krokodiloj.

\*\*\*

- Ĉu vi scias... se mi drinkos, neniun mi timas!  
- Ĉu eĉ ne vian bopatrinon?  
- Nu, tiom multe mi neniam drinkis.



## Facilaj rakontoj

### Almozpetanto

-- Rakonto de Apati Bela Kovac el Vesperto

Irante sur strato mi renkontis almozpetanton. Li aspektis kompatinde. Liaj vangoj estis malgrasaj, nur liaj grandaj, nigraj okuloj brilis, petante de mi iom da forintoj. Mi jam delonge ne manĝis – li diris – unu peceto da pano plezurigus min.

Mi demandis: "Kial vi almozpetas?"

Li alrigardis min kaj malgaje diris: "Ĉar mi estas malriĉulo."

"Se vi laborus, vi povus perlabori. Se vi havus monon, vi ne devus almozpeti."

Li cinike ĵetis siajn okulojn al mi. "Kie mi trovas laboron?"

"Certe iu labordonanto volonte dungus vin. Kiu volas, tiu trovas laboron."

Li ekridis. "Rigardu min! Ĉu mi estas tiu viro, kiun serĉas labordonantoj? Ne ridigu min!"

Eble li pravis - mi pensis – kaj mi provis konvinki lin: "Se vi lavus kaj razus, entute vi ŝanĝigus..."

Li abrupte interrompis mian predikon: "Homo, kie vi vivas?"

Efektive, kie mi vivas? Mi komencis mediti. Tiu ĉi viro estas malesperiĝinta. Mi volas konvinki lin, kion mi ankaŭ ne kredas. Miloj kaj dek miloj da laboristoj estas maldungitaj kaj familiojn minacas tragedio, tamen mi volas konvinki almozpetanton, ke li serĉu laboron.

Ja, se mi atenteme rigardus lin, mi devus vidi, ke

### sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

mia babilanto havas laboron. Li estas almozpetisto. Li mem entreprenas kaj kuraĝe staras ĉe la stratangulo kaj almozpetas. Mi komencis kalkuli kiom da forintoj li povas perlabori ĉiutage?

Se ĉiu preteriranto donas al li nur unu forinton, tiam dum ok horoj preteriras almenaŭ tri mil homoj. Ni ne forgesu, nia almozpetanto "deĵoras" en la centro de la urbo apud granda magazeno. Mi mem vidis per miaj propraj okuloj, foj-foje oni ĵetis cent aŭ ducent forintojn en ĉapelon. Se li estas sufiĉe lerta, tiam ĝis vespero en la ĉapelon li kolektos almenaŭ tri mil forintojn. Obligante ĝin per tridek, ĉar li staras tie ankaŭ sabate kaj dimanĉe, tiam fine la sumo superas naŭdek mil forintojn. (Mi devas rimarki, en Hungario simpla laboristo perlaboras malpli ol kvindek mil forintoj.) Nia almozpetanto ne pagas impostojn, eĉ de tempo al tempo li ricevas tagmanĝon kaj alian socialan helpon de la urbo.

Estas logike, kial elektas senhonte multaj homoj la almozpetadon.

Kompreneble tiu ĉi fenomeno ne estas ĝenerala, ĉar multaj almozpetantoj apenaŭ ricevas iom da mono kaj krom tio diversaj bandoj, kiuj vivas el la almozpetantoj, prirabas ilin.

Tamen estas pripensinde, ĉu nur la unusola ebleco estas la almozpetado, aŭ ekzistas ankaŭ alia solvo?



## Mallonga Historio de Filozofio (28)



### Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

### William James (1842-1910) kaj C.S.Peirce (1839-1914)

#### Kio okazis?

Magu sciuron en unu flanko de arbotrunko kaj ĉasiston en la alia flanko de la sama arbotrunko. La sciuro estas tiel lerta, ke kvankam la ĉasito turniras ĉirkaŭ la arbotrunko por kapti ĝin, ĝi ankaŭ turniras sur la arbotrunko do la ĉasito ne povas vidi ĝin. La demando estas: “Ĉu la ĉasisto, kiu turniras ĉirkaŭ la arbotrunko ankaŭ turniras ĉirkaŭ la sciuro?” Eble la respondo estas iomete stranga kaj oni respondus “Ne” sed William James respondis kiel jene: “Turniri havas du signifojn. La ĉasisto turnirante estas en la nordo, en la oriento, en la sudo kaj en la okcidento de la sciuro, tiam la respondo estas Jes ĉar li turniras ĉirkaŭ la sciuro, kaj tiu estas unu difino de la verbo turniri ĉirkaŭ io, sed se la ĉasisto devas esti antaŭ, dekstre, malantaŭ, kaj maldekstre de la sciuro, alia difino de la sama verbo, tiam la respondo estas Ne.”

William James estis **pragmatisto**<sup>1</sup> kaj li pensis, ke se la respondo donas nenion utilan al vi, tiam ne gravas al kio vi decidus. La tuta afero estas pri: “Pro kio vi volas scii tion, kaj al kio la respondo estos utila por vi?” Li iasence estis interesiĝanta je la mona valoro de penso. Se ne estas praktika valoro tiam ne ekzistas vereca valoro pri la demando. La vero ne estas io, kio atendas ke ni malkovru ĝin. La vero devas esti io, kio simple havas utilon por nia vivo.

**Pragmatismo** estis populara filozofia pensmaniero fine de la 19-a jc en Usono. Ĝia fondinto estis C.S.Peirce, kiu volis aldoni sciencajn aspekton al filozofio. Por ke io estu vera devas esti ia maniero por

eksperimenti kaj observadi sur ĝi. Se la tezo estas “la vitro estas rompebla” vi povas provi tion sur la vitro per martelo kaj eksperimenti. Tio estas praktika provo. Peirce ne ŝatis abstraktajn teoriojn, por li, vero estis tio, sur kio oni povis eksperimenti.



Kvankam homoj legis la verkojn de William James, tre malmultaj homoj legis la verkojn de C.S.Peirce, la fondinto de pragmatismo. William estis tre bona verkisto kaj li elspezis tro da tempo diskuti sur pragmatismo kun Peirce. Por William “la vero estis io, kio utilas” sed la vorto “utilas” havas iomete obskuran signifon en liaj verkoj. Li estis unu el la pioniroj de psikologio, kaj li ankaŭ interesiĝis ne nur pri scienco, sed ankaŭ pri la etika aspekto de la vero kaj malvero, kaj ankaŭ pri religio. Oni multe pridiskutis liajn verkojn sur religio.

La alproksimiĝo de William al “vero” estas iomete malsimila ol la tradicia difino de la vero, kiu estas “la vero devas esti taŭga al la okazintaĵoj ĉar ĝi devas priskribi la mondon en kiu ni vivas” sed por William la difino estis: “la vero devas doni praktikajn kaj utilajn rezultojn al ni”.

“Ĉu Dio ekzistas?” Je tia demando oni povas respondi “Jes” aŭ “Ne” aŭ eĉ “Mi ne scias” el kiuj la unuaj du fakte estas kaj “veraj” kaj “malveraj”. Sed por William la respondo estis bazita sur la fakto de la utileco kredi, ke Dio ekzistas. Li kredis, ke Dio ja ekzistas kaj li tion pridiskutis en sia verko “La varioj de la religia sperto” (1902). Por li, kredi je la ekzisto de Dio havis praktikan utilecon do, Dio ja ekzistas.

La angla filozofo Bertrand Russel poste mokis la pensmanieron de William. Li metis demandon: “Ĉu Patro Kristnasko, kiu alportas donacojn al infanoj ekzistas?” Laŭ William la respondo devus esti “Jes” ĉar por infanoj kredi je la ekzisto de Patro Kristnasko ja utilas, ili ricevas donacojn. Sed estas malsimileco inter “se tio estus vera” kaj “tio ja estas vera”. Ĉu la plenkreskuloj kredas je la ekzisto de Patro Kristnasko? Se jes ili ne plu aĉetus donacojn al siaj infanoj. Do kiel



**Horizontale**

1. La plej granda urbo el Svislando;
6. "Papilia efiko" estas ekzemplo de \_\_\_ teorio;
11. Loĝanto de antikva regionego de Mezopotamio;
12. Proksimume;
13. Tendenco en la stilo en kiu persono vestiĝas;
14. Rilata al tria monato;
15. La monunuo de Japanio;
16. Arbareto;
17. Mallongigo de urania karbido;
18. N;
19. Februaro, \_\_\_\_, aprilo;
20. Ni, vi, \_\_\_\_;
21. Besto kun flugiloj kaj beko;
22. Ankaŭ, simile;
23. Observemo;
25. Mikroskopaj fungoj;
26. Rondforma bakaĵo el pasto;
27. Flava malrekta tropika frukto.

1	2	3	4	5			6	7	8	9	10
11						12					
13					14						
15				16						17	
18			19						20		
		21						22			
23	24						25				
26						27					

10. Loko por la vendo de arto;
12. Pureco;
14. Buŝpreno;
16. Kantisto, menestrelo;
17. Longtiga aŭ glata arbo (akuzativo);
19. \_\_\_\_, cian, lian;
20. Antaŭa, eksa;
21. Brita Esperantista Asocio;
22. Refleksiva pronomo (akuzativo);
24. Konsonantoj de balo;
25. Komenca sillabo de Ŝafo.

**Vertikale**

1. Fondito de esperanto;
2. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko;
3. Plorado (kontraŭo);
4. Movo en ia direkto;
5. K;
6. Kristana preĝejo;
7. Andy Warhol estis ĉefo de la Pop \_\_\_\_;
8. Sepa, \_\_\_\_, naŭa;
9. Landokodo de Sauda Arabio;

Fonto: Semajno de Enigmoj #1  
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

**(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)**

la sama afero povas esti kaj vera kaj malvera?

Alia demando pri kiu filozofoj multe pridiskutis estis "La problemo de la ekzisto de cerbo de aliaj homoj". La demando estas : "Ĉu ni certas, ke la homoj ĉirkaŭ ni havas cerbon kaj agas kun iliaj cerboj?" Mi scias, ke mi ne estas zombio, kiu agas sen vivo-forto. Sed ĉu ankaŭ la aliaj homoj ĉirkaŭ mi estas kiel mi? Tiu estas malfacila problemo por solvi. William al tio respondis, ke ankaŭ la aliaj homoj devas havi cerbon ĉar ili akceptas, amas, afablas je mi. Ŝajnas ke la pragmatismo de William estas kredi je tio, kio al ni plaĉas. Ĉar por diri, ke la aliaj homoj ja havas cerbon kaj ili ne estas zombioj, tio plaĉas al ni.

La Usona filozofo Richard Rorty daŭrigis la pragmatisman pensmanieron. Por li ne estas unu vero, ekzemple homoj povas kompreni la verkojn de Shekspeare malsimile laŭ la tempo ili legas ilin kaj do ne ekzistas ununura vidpunkto en tiu mondo.


<sup>1</sup> **pragmatismo**. Filozofia doktrino, kiu akceptas kiel kriterion de vereco nur la uzeblon de ideoj.

**(daŭrigota)**

**L**a mondo estas plenplena je malsamaj organismoj. Kvankam la ekzaktaj rilatoj povas esti ankoraŭ svagaj, oni scias ke bestoj, plantoj, fungoj kaj bakterioj ĉiuj estas foraj parencoj. Ke organismoj tamen estas tiom diversaj, estas pro tio ke ili apartenas al diversaj specioj. La fama biologo Charles Darwin detale ellaboris kiel tiuj specioj ne estas eternaj kaj neŝanĝeblaj. Li ligis la pruvojn kiuj montras ke specioj malrapide ŝanĝiĝas kaj disiĝas por krei novajn speciojn. Tiu procezo estas priskribata de la teorio de evolucio. La vorto "teorio" povas esti konfuziga kiam ĝi estas uzata tiel, ĉar ĝi havas malsaman signifon en scienco ol en la ĉiutaga uzo. En scienco, teorio estas klarigo de iu fenomeno kun aro de fortaj pruvoj kiuj estas strukture kontrolitaj kaj testitaj. Sciencaj teorioj travivis ĉiujn kritikojn kaj estas konsiderataj kiel vero ĝis iu trovas akceptitan kontraŭpruvon. La teorio de evolucio specife estas unu el la plej fortaj teorioj kiuj ekzistas. Malgraŭ tio, sciencistoj daŭre esploras evoluon. Tiaj esploroj ne celas prui la ekziston de evoluo, kvankam ili ja kreas tiajn pruvojn kiel kromproduktojn, sed anstataŭe esploras la specifajn meĥanismojn kiuj funkciigas evoluon. Tiaj esploroj kovras plurajn sciencajn kampojn kiel paleontologion kaj genetikon.


Unu el la plej famaj ekzemploj de evoluo venis de Darwin mem kaj temas pri la diferencoj inter malsamaj birdoj. Kiam li vizitis la Galapagojn en la Pacifika Oceano, li rimarkis ke la insuloj surhavis birdojn el kiuj kelkaj multe similis, sed ĉiuj havis siajn proprajn adaptaĵojn. Birdoj kiuj manĝis grandajn semojn havis grandajn rondajn bekojn, dum la birdoj kiuj manĝis etajn semojn aŭ insektojn havis etajn, akrajn bekojn. Denove en Britio oni analizis la informojn kaj eltrovis ke fakte 15 specioj de birdoj kiuj vivis sur la insuloj estis tre similaj. Tiutempe la ĝenerala konsento estis ke la specioj kiuj nun troveblas, ĉiam ekzistis kaj ke ili verŝajne estas eternaj. Darwin tamen, estis unu el la unuaj homoj kiuj kuraĝis pensi pri malrapida ŝanĝiĝo de specioj kaj eĉ elpensis meĥanismojn por klarigi tiujn ŝanĝiĝojn. Jarojn post lia vojaĝo, en 1859, li publikigis lian libron "On the Origin of Species" (Pri la origino de specioj) en kiu li ellaboris liajn ideojn pri evoluo. La malsamaj birdspecioj de la Galapagoj havas laŭ Darwin komunan praavon. Tiu praavo estis baza birdo kiu origine disvastiĝis sur la insuloj. Tiuj insuloj havis malsamajn ekologiajn niĉojn, la malsamaj lokoj kiujn organismo povas havi en ekosistemo. Estas multaj birdoj, do nur tiuj kiuj estas plej adaptitaj al la niĉo povas akiri manĝon kaj poste reprodukti sin. Tiel dum multaj generacioj la populacio disiĝas kaj la

birdoj ene de niĉo pli kaj pli malsimilas al tiuj en aliaj niĉoj. Post longa tempo la birdoj estas tiom malsamaj ke se ili renkontus unu la alian, ili ne povus havi fekundajn idojn.



^ La birdoj havas malsamajn bekojn por malsamaj celoj.

Ekzistas du ĝeneralaj sistemoj kiuj gvidas evoluon. Unu el ili estas natura selektado kaj la alia estas genetica drivo. Natura selektado estas la plej konata el la du kaj respondecas pri tio ke organismoj malrapide iĝas pli bone adaptitaj al sia medio. En la tempo de Darwin, nenio estis konata pri DNA kaj genoj, sed oni ja rimarkis ke infanoj tre similas al la gepatroj. Iu sistemo do ebligas al gepatroj transdoni kvalitojn al la infanoj. Tio estas grava en la naturo, pro tio ke tiaj kvalitoj povas pozitive aŭ negative influi la probablecon ke organismo reproduktos sin. Imagu arbaron en kiu troviĝas leporoj kaj vulpoj. Ne ĉiuj leporoj havas la samajn kvalitojn kaj eble ekzistas leporoj kiuj havas kvalitojn kiuj igas ilin pli rapidaj ol la aliaj leporoj. Kompreneble la rapidaj leporoj malpli verŝajne estos manĝataj de la vulpoj ol la malrapidaj, kio donas al ili pli da ŝancoj por reprodukti sin. Ĝenerale la grupo de rapidaj leporoj do havas pli da idoj. La leporoj donas la kvalitojn al siaj idoj kaj post multaj generacioj pli kaj pli da leporoj estas rapidaj. Aliaj meĥanismoj kaŭzas ke hazarde novaj variaĵoj de tiaj kvalitoj povas ekaperi, kio ebligas al la leporoj iĝi eĉ pli rapidaj, ĝis la evolua premo malfortiĝas. Tio povas okazi ekzemple kiam iĝi pli rapida kostus tro da energio, aŭ se la leporoj ekhavis aliron al regiono kie ne loĝas vulpoj. Natura selektado estas kerna principo en evolua teorio, ĉar ĝi montras ke oni ne bezonas homojn aŭ alia inteligenta estaĵo por antaŭenigi la procezon. La medio mem estas la katalizanto de evoluo.



*^ĝirafoj estas ofta ekzemplo de natura selektado. La longa kolo helpas ilin.*

La antagonisto de natura selektado estas genetica drivo. Foje organismoj ne travivas pro tio ke ili estas pli bonaj je tio ol aliaj organismoj, sed pro tio ke ili bonŝancis. Ofte tio okazas kiam iu natura katastrofo okazas, kiu murdas multajn organismojn el populacio. Se bestoj kun specifaj kvalitoj estas pli severe trafataj ol aliaj, tio povas ŝanĝi kiom ofte specifaj kvalitoj troveblas en tiu populacio. Imagu ke oni havas vazon kun cent perloj de malsamaj koloroj. Se oni elprenas dek hazarde ekzistas granda ŝanco ke la prenitaj perloj ne reprezentas la perlojn kiuj origine estis en la vazo. Eble unu koloro eĉ tute malaperis. Specife malgrandaj populacioj estas tre vundeblaj al tiu efiko, pro tio ke oni povas draste ŝanĝi la kolordividon de la perloj nur per "murdi" kelkajn perlojn. Alia efiko okazas kiam organismoj eniras novan loĝlokon. Imagu ke sur iu insulo kreskas flavaj, bluaj kaj ruĝaj floroj de la sama specio. Eble la vento blovas semojn al najbara insulo, sed nur tiuj de la blua floro. Tio signifas ke tiuj bluaj floroj kreas novan populacion sur la najbara insulo, kiu nur konsistas el bluaj floroj. En tiu nova populacio la divido de malsamaj kvalitoj estas tute malsama ol en la origina populacio. Genetika drivo kaj natura selektado samtempe funkcias kaj influas ĉiujn kvalitojn samtempe, sed ne same multe. Ju pli la kvalito influas kiom verŝajne organismo reproduktos sin, des pli granda la efiko de natura selektado estas, sed se la efiko de la kvalito estas neŭtrala, genetica drivo estas dominanta.

La teorio de evoluo estis nova kaj tiutempe sufiĉe radikala ideo, do sciencistoj ne tuj akceptis ĝin kiel ĝusta. Malgraŭ kontraŭaj teorioj kaj kritikemaj sciencistoj tamen, pli kaj pli da pruvoj estis trovataj kiuj subtenis la ideon de evoluo. Unu el la plej bonaj el tiuj venis el la kampo de paleontologio kaj estis tiom perfekta ke oni origine pensis ke ĝi estis mensogo. Temas pri la unua fosilio de Archaeopteryx, genro de bestoj kiuj ne vere estis birdoj kaj ne vere reptilioj. La fosilio havis longan ostan voston kaj dentojn kiel

dinosaŭroj, sed flugilojn kiel birdo. Tio igas ĝin transira fosilio, ĉar ĝi montras la transiron inter reptilioj kaj birdoj. Iusence ĉiuj fosilioj estas transiraj fosilioj, pro tio ke evoluo estas konstanta, malrapidega procezo kiu ne iras tra apartaj paŝoj. La fosilioj de Archaeopteryx tamen, plenigis truon en la kompreno de la evoluo de birdoj pri kiu oni ne trovis fosiliojn antaŭe. Kio igis la fosilio tiom perfekta ne nur estis periodo en kiu ĝi estis malkovrita, sed ankaŭ la kvalito de la fosilio mem. Ĝi venis el "Lagerstätte", la paleontologia termino por loko kiu havas fosiliojn de tre diversaj fosilioj, kiuj ekstreme bone konserviĝis. "Lagerstätte" povas krei multmaniere, sed ili ĉiuj havas komune ke ili kreas medion en kiu organismo povas morti sen ĥemiaj reagoj aŭ aliaj organismoj kiuj detruas la fosilion. Tio povas okazi ekzemple post natura katastrofo, aŭ en tre sala lago. Kutime oni nur trovas dentojn aŭ ostojn de bestoj tiom aĝaj kiel Archaeopteryx, sed pro la kvalito de la ŝtono en kiu ĝi troviĝis, oni povas ankoraŭ vidi la spurojn de la plumoj. Kiam pli ol dek aliaj specimenoj estis trovitaj, el kiuj kelkaj eĉ pli bone konserviĝis ol la origina specimeno kiu nun troviĝas en Londono, oni povis certi pri la loko de Archaeopteryx en la naturo kiel la kuzoj de modernaj birdoj kaj pri la rolo de evoluo en paleontologio. Ili montris, kune kun fosilioj de aliaj specioj, kiel brakoj kun fingroj ŝanĝiĝis al aloj kaj kiel buŝo kun dentoj ŝanĝiĝis al beko.




*^ Archaeopteryx*

La malkovroj pri evoluo kaj fosilioj estis tre gravaj, sed ili ne klarigis la tutan rakonton. Darwin kaj aliaj sciencistoj rimarkis ke organismoj transdonas siajn kvalitojn al siaj infanoj, sed havis

neniun ideon pri kiel tio ekzakte okazis. En la 19a jarcento, pli ekzakta priskribo de kiel la kvalitoj estas transdonataj venis de Gregor Mendel, monaĥo kiu dum jaroj kreskigis pizojn kaj strukture analizis la rilatojn inter gepatroj kaj gefiloj por statistike priskribi la transdonon de malsamaj kvalitoj. Li eltrovis ke tiuj kvalitoj, ekzemple la koloro aŭ longo de la planto, ne same facile transdoniĝis. Kelkaj kvalitoj estis dominantaj kaj kelkaj ne. Du gepatroj kun blankaj floroj nur produktis idojn kun blankaj floroj, sed tiuj kun ruĝaj

floroj povis krei kaj ruĝajn kaj blankajn idojn. Mendel uzis liajn observojn kaj statistikon por konkludi ke la kvalitoj de la planto estas priskribataj de "faktoroj", kiujn ni nun nomas genoj. Tiuj faktoroj havas malsamajn variaĵojn kiujn ni nun nomas alelojn. Organismoj havas du alelojn de ĉiu geno kaj se ambaŭ estas nedominantaj, la organismo esprimos la nedominantan kvaliton, sed se eĉ unu el la aleloj estas dominantaj, ĝi esprimos la dominantan kvaliton. Dum la 20a jarcento oni malkovris DNA kaj ĝian strukturon kaj ekkomprenis kiel DNA estas la kodo per kiu genoj estas verkataj. Oni komprenas nun ke DNA estas ordigata en strukturoj kiuj nomiĝas ĥromosomoj kiam ĉeloj disiĝas kaj kreas ekzaktan kopion. Kontraste, en spermo kaj ovĉeloj ekzistas nur duono de la DNA kaj diversaj aleloj estas hazarde interŝanĝataj por krei tute novajn kombinojn de aleloj en ĉiu ĉelo. Kiam la spermo kaj ovĉelo renkontiĝas, ili kombinas sian DNA kaj kreas tute unikan individuon. Ĉi tiel, la malsamaj kombinoj de aleloj estas testataj kaj neniu organismo estas identa. Tio estas utila, pro tio ke ŝanĝiĝoj en la medio kaj malsanoj povas murdi nur parton de la populacio kaj tiuj kun pli taŭgaj aleloj travivas. Se ĉiu organismo havas la saman DNA, malsano kiu murdas unu povus facile murdi ĉiujn, kiel okazis plurfoje en la historio al bananoj kaj terpomoj, kiuj fakte ĉiuj estis genetike identaj pro la maniero per kiu ili estis produktataj. Kvankam tio ĉi ja klarigas kiel malsamaj kombinoj de aleloj povas disvastiĝi, ĝi ne povas klarigi evoluon, pro tio ke tute novaj aleloj necesas por antaŭenigi la specion. Tiuj novaj aleloj ja ekzistas kaj estas la rezulto de mutacio.



^ La malsamaj genkombinoj donas malsamajn pizojn.

Mutacio povas esti sufiĉe timiga vorto kiu ofte estas uzata por priskribi monstrojn el filmoj, sed ĝi

estas ĉiutaga afero kaj sen ĝi nenio pli ol la plej primitivaj organismoj povus ekzisti. Mutacio povas okazi pro pluraj mediaj efikoj, kiel altenergia radio aŭ malsanigaj ĥemiaĵoj, sed grandega parto el ili estas simple la rezulto de eraroj en la kopiado de DNA. La plejparto de mutacioj estas malbonaj aŭ neŭtralaj, sed foje ili povas esti utilaj. Se tia mutacio okazas en hazarda loko, ĝi ne ŝanĝas multe longtermine, sed se ĝi okazas en la seksorganoj, ĝi povas esti transdonata al seksĉelo kaj krei idon kiu havas la mutacion en ĉiuj ĉeloj. Komprenable la DNA havas bonajn sistemojn por ripari la plejmulto de eraroj, do infanoj ankoraŭ ege multe similas al siaj gepatroj, sed post miloj da generacioj, la ŝanĝiĝoj povas iĝi sufiĉe evidenta. Unu el la plej aktualaj mutacioj kun pozitiva efiko estis tiu, kiu ebligis al multaj homoj el socioj kie homoj loĝis kun bovinoj trinki lakton post infaneco. Tiu ŝanĝiĝo ne estas pli aĝa ol kelkaj miloj da jaroj. En bakterioj, kies generacioj foje daŭras nur duonhoron, oni eĉ povas vidi evoluon dum homa vivo. Bakterioj havas iomete malsamajn meĥanismojn por transdoni genojn, sed la kernaj principoj de evoluo ankaŭ por ili validas. La rezulto de tio estas ke eĉ se oni murdas la plejparton de bakterioj per antibiotiko, tiuj kiuj travivas povas sinreprodukti kaj finfine krei specion kiu rezistas tiun antibiotikon. Tial oni uzu antibiotikon nur kiam ĝi vere necesas.

Ke ĉiuj specioj estas parencoj, estas unu el la plej belaj malkovroj en scienco. Ĝi igis nin multe pli bone kompreni nian biologion kaj lokon en la historio de la Tero. Ĝi estas unu el la plej fortaj teorioj kaj montras ke la mondo ĉiam estas multe pli bela kaj interesa ol ĝi ŝajnas. Ĉiam kiam oni pensas ke oni preskaŭ komprenas ĝin, oni malkovras ion kio ŝanĝas ĉion. Krom tiuj fundamentaj komprenoj, la malkovroj en la kampoj de genetiko kaj evolua teorio havas pli kaj pli da praktikaj aplikoj kaj helpas nin kompreni kaj kuraci malsanojn kaj krei plantojn kiuj povas nutri pli da homoj en pli da medioj. Kiu scias kio sekvos?

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/04/04/la-vojo-de-evoluo/>

## Ĉu esperantistoj bezonas propran valuton?

-- el Libera Folio

**L**astatempe furoras ciferecaj valutoj kiel Bitcoin. Unu el ili eĉ havas Esperantan nomon: Monero. Pli frue esperantistoj kreis kaj eĉ iom uzis proprajn valutojn kiel Spesmilon kaj Stelon. Robert Nielsen demandas sin, ĉu eble indus, ke esperantistoj nun ekuzu propran ciferecan valuton. Esperanto estas internacia lingvo, sed ĉu ni

bezonas internacian valuton? Ĉe ĉiu kongreso, homoj venas el malsamaj landoj por uzi komunan lingvon, sed ĉu ili ankaŭ povus uzi komunan valuton? Nuntempe estas granda kresko de ciferecaj monoj (interretaj valutoj) kiel bitmono, kaj tiu pensigis min. Imagu se



nia komunumo havus valuton.



Stelo-monero de 1965.

Fakte la internacieco de Esperantujo malfaciligas la uzon de nacia valuto. Ekzemple, ĉe la Universala Kongreso, venas homoj el 60-70 landoj kun multegaj malsamaj valutoj. Estas vere malfacile por la organizantoj regi tiom da valutoj, kaj se estus nur unu, tio multege plifaciligus la aferon. Ĉiuj perdas monon pro la monŝanĝaj kotizoj, do se estus internacia valuto, ĉiuj ŝparus monon. La revuo Esperanto fanfaronas ke ĝi havas abonantojn en 120 landoj, sed tio signifas multajn valutojn. Kontakto listigas sian prezon en 15 valutoj ĉe la unua paĝo de ĉiu numero. Kompreneble la kreado de la eŭro certe helpis malgrandigi la liston, sed ankoraŭ estas multaj.

Ĉi tio ankaŭ povus subteni kreemajn esperantistojn. Verkistoj, muzikistoj, filmetistoj povas krei materialon kaj fortigi nian kulturon nur se la komunumo subtenas ilin. Sed, bedaŭrinde, tre malfacilas gajni sufiĉe da mono por vivi per Esperanto, kaj la plejparto de la kreintoj estas volontuloj. Malfacilas donaci pro teknikaj problemoj, bankadministrado ktp, do la afero estas komplika eĉ por malgrandaj sumoj.

Imagu se anstataŭe ĉiuj blogistoj kaj vlogistoj simple donus sian kont-numeron ĉe la fino de la artikolo aŭ filmeto. Se oni ŝatis kaj volas subteni, oni povas facile alklaki la butonojn kaj tuj sendi monon por danki. Se ni havus nian propran valuton, oni ne bezonus kontroladon de bankoj aŭ la longegan atendon de la UEA-konto. La plej bona parto estas ke oni povus sendi eĉ etajn sumojn. Se multaj homoj farus tion, entute estus granda sumo. Ĉi tiuj "pagetoj" povus subteni kaj interligi nian komunumon.

Honeste, alia bona kialo por krei valuton simple estas ke tio estus mojosa. Ĉu ne estus mojose, se ni havus nian propran monon? Kio estas Esperanto – lingvo kun flago, himno kaj valuto. Estus amuze havi nian sekretan monon kiun nur ni konas. Eĉ se homoj uzus ĝin nur por ŝajna ludo, tio estus amuza, miaopinie. Ĝi povus vekti intereson el la ekstera mondo kaj allogi novajn homojn. Ĝi estus ekzemplo de la tutmondeco de Esperanto kaj la kunlaboremeco de la komunumo.

Ekzistas longa historio de multaj provoj krei valuton

por Esperantujo. En 1907, oni kreis "Spesmilon", kiu strebis esti internacia banksistemo, sed ĝi malaperis post la unua mondmilito. Inter 1947 kaj 1993 ekzistis la "Stelo", kiu strebis esti internacia valuto kaj solvi la problemojn kiujn mi jam menciis. Oni volis havi komunan monon por pagi por revuoj kaj kongresoj. Do mia ideo simple estas nova versio, sed ĉi-foje interrete. Oni povus nomi ĝin la "Nova Stelo".



Stelo-moneroj de 2012.

Fakte dum junularaj kongresoj jam ekzistas "valuteto". Kutime troviĝas drinkejo, sed ĉiam estas valutaj problemoj, ĉu oni uzu la lokan valuton aŭ la pli grandan eŭron, sed estas multaj homoj kiuj havas nek nek. Pli facilas por ĉiuj, se estas nur unu menuo, ne multaj laŭ valutoj. Do, dum la pasinta JES, la drinkejo akceptis nur Stelojn, plastajn ĵetonojn kun fiksita interŝanĝa valoro (pola zloto valoris unu kaj eŭro valoris kvar). Imagu se ni konvertus tion al vera valuto.

UEA preskaŭ jam havas sian propran bank-sistemon, la UEA-kontojn, sed ĝi estas pra-sistemo. Mi povas sendi monon al iu alia membro de UEA kaj pagi por kongresoj per la kontoj. Sed la sistemo estas tre antikva kaj malrapida. Por sendi monon, mi devas sendi retmesaĝon al la financisto de UEA, kiu eble post kelkaj tagoj sendos la monon. Eĉ por kontroli kiom da mono estas en la konto oni devas sendi retmesaĝon kaj atendi kelkajn tagojn. Imagu se oni plibonigus la UEA-kontojn, tiel ke oni povu rapide sendi kaj ricevi monon per sia poŝtelefono?

Jam ekzistas ĉirkaŭ 1.500 ciferecaj valutoj (kaj tiu ĉi nombro rapide kreskas). Unu jam havas esperantan nomon. Monero uzas esperantan vorton por sia nomo kaj por aliaj partoj, ekzemple monujo. Sed 99% el ĝiaj uzantoj ne scias aŭ eĉ ne konas Esperanton, do la nomo estas la sola konekto. Ĉu indas aliĝi al jam ekzistanta valuto kaj konverti ĝin al Esperanta mono? Mi ne konsentas, ĉar la plejparto el la homoj kiuj aĉetas ciferecan monon nur revas pri riĉeco, ili prifajfas la valuton. Fakte ĉifromono enhavas multajn problemojn, kiuj maltaŭgigas ĝin por uzo en Esperantujo.

En pli frua artikolo mi pritraktis la problemojn kaj difektojn de bitmono, kaj mi opinias ke estas tre grave ke ni evitu tiujn problemojn, se ni kreu Esperantujan valuton. La unua kaj plej grava problemo estas ke

bitmono ne funkcias kiel valuto. Preskaŭ neniu elspezas ĝin, kaj neelspezinda valuto senutilas. Homoj aĉetas bitmonon nur ĉar ili volas riĉiĝi, do ili aĉetas kaj atendas ĝis la prezo plialtiĝas kaj tiam ili vendas ĝin. Ili nur spekuladas kvazaŭ ĉe kazino.

Mi ne volas krei valuton nur por riĉiĝi, mi volas krei ion, kio vere utilas al la komunumo. Estas kelkaj kernaj problemoj kun bitmono kaj aliaj ciferecaj monoj kiuj malebligas ilin kiel veran valuton. Unue, ili estas ege malstabilaj, kaj la prezo multe fluktueblas. Ĉi tio estas katastrofo por valuto. Imagu se mi volas pagi por kongreso, sed en unu tago ĝi kostas €200, en la venonta €250 kaj poste €150. Mi povus mendi libron, sed kiam ĝi alvenos, la prezo jam estos alia. La valutoj estas malstabilaj ĉar ili estas malcentraj, neniu regas la sistemon. Ne estas iu centra banko por protekti aŭ gvidi ilin, anstataŭe ili svingiĝas kun la vento.

Ĉar la kvanto de mono estas fiksita, la valuto estas deflacia, kaj ju pli multe da homoj aliĝas, des pli alta iĝas la prezo. Sed se la prezo daŭre plialtiĝas, ne estas instigo elspezi la valuton, fakte estas puno kontraŭ elspezo. Se mi elspezas la monon kiam la prezo estas 5, sed poste ĝi altiĝos al 10, mi sentas min stultulo, ĉar mi maltrafis la ŝancon duobligi mian monon. Sed se homoj ĉiam atendas plialtiĝon de la valuto, ili neniam elspezas ĝin. Se ĉiuj nur tenas la valuton, atendante altiĝon, tio malstabiligas la valuton.



Esperanta mono kiel artprojekto.

Por eviti tiujn problemojn, mi proponas ke nia valuto havu centran bankon, preferinde UEA kaj/aŭ TEJO. Por eviti spekuladon, preferindas ke la prezo estu nemovebla aŭ almenaŭ tre rigida, verŝajne ligita al iu granda valuto kiel la eŭro aŭ dolaro. La centra banko povus facile krei pli da moneroj por pligrandigi la kvanton de mono laŭ la bezonoj de la valuto. Se la prezo estas tro alta, ili vendus pli por malaltigi la prezon kaj certigi ke la valuto estu stabila.

Mi proponas UEA aŭ TEJO, ĉar ili estas fidindaj organizoj kiuj prioritigas la movadon anstataŭ gajni monon. Male ol ĉe multaj aliaj ciferecaj valutoj, oni ne timus ke ili prirabos nin kaj forŝtelos la monon. Ili jam havas grandan reton de esperantistoj kaj lokoj kie esperantistoj elspezas monon, kiel la libroservo kaj kongresoj. UEA estas pli granda, sed TEJO estas pli juna kaj malferma al novaj ideoj, do eble ili pli emus

regi la valuton.

Mi volus ke la valuto estu tute neprispekuladebla. Se iu profitus per aĉetado kaj vendado de la valuto, tio estus eraro. La celo de la valuto estas uzo kaj utileco, ne spekulado kaj alta prezo. Estu nur unu oficiala vendejo de la valuto (eble la retejo de UEA aŭ TEJO), kaj ni povus eĉ malebligi la vendadon de ĝi.

Se oni aĉetu, oni devu elspezi en Esperantujo aŭ sendi al aliaj esperantistoj. Tio povus esti enspezo por UEA kaj TEJO, kiuj certe bezonas financan helpon. Ĉi tio ankaŭ evitigus la alian grandan problemon de ĉifromonoj, ŝteladon kaj trompon. Multege da vendejoj trompis klientojn kaj prirabis ilin, tial mi proponas unu fidindan vendejon.

Aliaj ĉifromonoj havas "blokĉenon", kio estas publika librotenado. Sed ni ne bezonas tion, ĉar kiu volas publikigi siajn elspezojn? Mi ŝatas mian privatecon kaj ne volas ke ĉiuj povu vidi kiom mi elspezis en la drinkejo, kaj neniu firmao volas ke ĉiuj sciu kiom estas la enspezoj kaj elspezoj. La blokĉeno krome estas tre malefika, ĉar ĝi bezonas multege da komputila energio por konfirmi pagojn kaj krei novajn monerojn.

Se la centra banko farus tion, tio multe simpligus la aferon. Aliaj ĉifromonoj devas pagi homojn por ke ili konfirmu pagojn, per novaj moneroj aŭ per transpagaj kotizoj. Pro tio, la pagoj de bitmono estas malrapidaj kaj multekostaj, sed ni havus centran bankon, ĝi estus pli rapida kaj senpaga.

Multaj ciferecaj valutoj ne havas komunumon aŭ kialon por uzi ilin. Ili estas kvazaŭ solvoj serĉantaj problemojn. Esperantujo estas speciala, ĉar ni jam havas komunumon kaj jam havas kialon kaj bezonon por internacia mono. Oni povus facile informi milojn da homoj per blogoj, jutubaj filmetoj kaj gazetoj.

Do mia ideo estas ke homoj povu ŝanĝi nacian valuton al la "Nova Stelo" ĉe la retejo de UEA aŭ TEJO. Per ĉi tiu mono, oni povus pagi kotizon al iu kongreso, abonon al revuo, aĉeti libron aŭ muzikon kaj tiel plu. En la kongreso oni povus aĉeti bieron aŭ ion alian en la vendejoj.

Tial preferindas ke estu iu poŝtelefona apo por facile sendi la monon. Aŭ eble se mi simple dirus mian kodon (kiel la UEA-konto), la vendisto povus aŭtomate elpreni la monon el mia konto (kompreneble estus kontroloj por konfirmi tiujn elprenojn). Poste mi povus danki kaj subteni per donaco esperantistojn kiuj verkas interesajn artikolojn. La valuto estus tute stabila kaj ĉiuj povus facile kaj senpage sendi monon.

Bedaŭrinde mi scias tute nenion pri programado aŭ la teknikaĵoj de ciferecaj valutoj. Mi petas ke programistoj kontaktu min por diskuti la eblecon de mia ideo. Kiuj estas eblaj problemoj, kostoj, teknikaĵoj?

Mi volis nur doni kelkajn proponojn el financa kaj ekonomia vidpunktoj. Ĉu ĉi tiu estas bona ideo? Ĉu indas krei nian propran valuton? Ĉu mi proponis bonan sistemon por la valuto? Eble ĉi tiuj estas frenezaj neatingeblaj ideoj, sed ĉiuj novaj inventoj unue nur estis frenezaj ideoj, ĉu ne?

verkis **Robert Nielsen**

La artikolo unue aperis ĉe Teo kaj libroj

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2018/03/03/cu-esperantistoj-bezonas-propran-valuton/>

## Pri ENA

sendis Bert Boon

Estimata!

Jen: informilo pri ENA

Amiko transsendis al mi la januaro-numeron de via enhave kaj aspekte brila revuo "Turka Stelo". Mi kore gratulas!

Kiel delegito pri esperanta numismatiko mi plentuziasme legis la ampleksan artikolon pri "Monda Monunuo: La Stelo". Tiu artikolo sendube scivolemigis ankaŭ multajn legantojn de via revuo. Ankaŭ en nia asocia revuo, kiu aperos denove je la fino de aprilo, ni mencias vian revuon kaj la artikolon sur pagho 26 pro la interesaj informoj.

Ni reciproke petas vin aperigi en "Turka Stelo" la informan varbilon kiun mi sendas aldone al chi mesagho. Esperantaj asocioj prefere helpu unu la alian, ĉu ne? Ghis nun ENA havas 90 individuajn membrojn (kaj 20 asociojn) en kaj ekster Eŭropo, sed neniu turkan esperantiston! Bedaŭrinde!

Ni deziras al vi multsukcesan agadon en Turkio kaj eksterlande.

Samideane kaj numismate,

Mag. Fil. **Bert Boon**

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 90 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2017 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)


**Vi rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

**Bert Boon**

Iniciatoro de ENA,

Ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"



## Estas Printempe (Facila)

**E**stas printempe kaj en nia ĝardeno ĉio verdas kaj floras. La floroj bonodoras kaj ridetas al mi, kiam mi promenadas inter la arboj kaj arbustoj.

La printempo estas la plej bela sezono. Ĝi ĉiam surprizas min per sia ĉarmo.

Mi ŝatas aŭskulti la triladon de la birdoj. Vintre mi nutris ilin per bongustaj semoj. La malfeliĉuloj malvarmis kaj tremis pro la frosto. Sed la printempo alportis ankaŭ al ili gajan vivon.

Kia harmonio estas en la aero. Ĉiu homo adoras ĉi sezonon, ĉar ĝi muzikas, kiel iu ĉiela orkesto.

Mi haltas antaŭ floranta abrikotoarbo kaj enspiras ĝian ebrigan odoron. Mi rigardas interesiĝante la abeleteojn, kiuj flugadas de floro al floro kaj ili portadas la amon de l' printempo.

Mi ekmemoras pri malnovaj printempoj, kiel junulo same mi mirante ĉirkaŭbrakumis la printempon.

Kiom da printempoj mi havos ankoraŭ. Mi ne scias. Ĉu ĉiu printempo estos belega, kiel la nuna, aŭ en iu

## verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario

jaro ankaŭ la printempo estos griza kaj malgaja.?

Mi ŝatas printempon, ĉar ĝi ĉiam renovigas mian koron kaj por unu minuto mi sentas min denove junulo.

— Verkis: Apáti Kovács Béla —



## Poemoj

### HEJMA KATO

Sen tedom', ne stridas, ne bruas  
La kantece tenera son'.  
Laŭ la ĉambra spaco ekfluas  
Trankvilige ronron'- ronron'.

Se ne eblas regi malhelon  
De l' preme deprima staŭ',  
Sian pace varman fabelon  
Al mi kantas la hejma kat'.

Kio estas katoj pri forto  
De l' efiko al mishumor'?  
Kien sinkas tuj malkomforto?  
Kiel katoj ĝin pelas for?

Ĉie ĉiam tondroj plu restas  
le malico de sia bat'.  
Mi en mia hejmo nun estas –  
Vere hejme dank' al la kat'.

**Klara Ilutoviĉ**, el Rusio

### VESTO

Korp' estas vesto vivanta,  
kiun oni denaske gajnas.  
Jen ĉiutaga miraklo -  
poezie pri ĝi mi zorgas:  
pano, kiu nutras revon,  
kaj igas tolerebla tagon.

En ĉi tiu punkt' de l' vivo,  
fiere kaj ĝoje mi diras,  
ke mi kapablas ankoraŭ  
mian korpon promenigi,

Dum horoj plenaj de lumo,  
ĉu en urb' aŭ en kampar',  
mi deziras, ke ĝi trinku  
la tutan misteron bluan  
de ĉi matenoj aŭtunaj.

**Maria Nazaré Laroca**  
el Brazilio



### DUM MONDON MI FORLASI DEVOS

Dum mondon mi forlasi devos  
pri viv' pli bona mi ne revos.  
Ankoraŭ mi ne scias tion,  
kian mi kantos melodion,  
pri la sepult' de korpo mia  
vivanta en mizer' varia.  
Delonge ĉesis mi malĝoji  
pri belaj aĵoj jam perditaj.  
Ĉu devus ree mi misvoji  
serĉante ilin jam ŝtelitajn?  
Delonge mi forĵetis revojn  
pri la perdita paradizo.  
Vivante mi plenumas devojn  
laŭ vortoj de l' jena devizo:  
Mi vivas por ke viv, nomiĝu...  
kaj por ke al virin' edziĝu  
en ia urb' ĉe la rivero,  
en iu lando sur la tero,  
kie al ŝi mi hejmon faru,  
ĝis mort' kunvivi ŝin deklaru.  
Kaj sur la nia tomb' komuna  
la vent' tempesta, la aŭtuna  
rompu branĉetojn sekiĝintajn,  
diserigeblajn, velkiĝintajn.



tradukis **Edward Jaśkiewicz** el Pollando  
(poemo de Stanisław Wyspiański)




**Q**ingming, kiu signifas klaron kaj brilon en la ĉina lingvo, estas la tago por fari oferojn al prauloj. Ĝi falas en la 4an, 5an aŭ 6an de aprilo ĉiujare kaj respondas al la alveno de pli varma vetero, la komenco de printempa plugado, kaj familiaj ekskursoj.



Antaŭ ol mi parolas pri Qingming, mi devas diri ion pri alia antikva okazaĵo, Hanshi, kiu ĉiam venas unu tagon antaŭ Qingming-

Festo. Hanshi laŭvorte signifas malvarman manĝaĵon. Oni diras, ke en la sepa jarcento antaŭ la kristana erao dum la periodo Printempoj kaj Aŭtunoj (770-476 a.K.), duko Xian estis la monarko de la regno Jin. Lia plej aĝa filo Shen Sheng devus heredi la tronon post la morto de la patro. Sed duko Xian havis aliajn planojn. Li deziris, ke la filo de lia ŝatata kromedzino Li Ji sukcedu lin kiel la reganto de la regno Jin. Duko Xian, tute neamema patro, murdis la plej aĝan filon Shen Sheng kaj intencis fari la samon al la dua filo, Chong'er, sed Chong'er eksciis pri ĉi tio kaj forkuris.

Dum 19 jaroj, Chong'er kaj lia sekvantaro de lojalaj oficialuloj kaj servistoj vagis senhejmaj. Lutage Chong'er estis tre malsata kaj proksima al morto. Unu el liaj plej fidelaj sekvantoj, Jie Zitui, tranĉis pecon da muskolo el sia propra kruro kaj donis ĝin al sia mastro, tiel savante lian vivon. Fine en la jaro 636 antaŭ la kristana erao, Chong'er sukcese suriris la tronon, kiu estis laŭleĝe lia, kaj ricevis la oficialan titolon de duko Wen de la regno Jin.



Post la surtroniĝo, Chong'er decidis rekompenci oficialulojn, kiuj restis kun

li dum la 19-jara vagado. Sed li forgesis Jie Zitui, kiu oferis la karon de sia kruro. Jie Zitui estis afliktita kaj foriris. Poste Chong'er memoris la oferon de Jie Zitui kaj sendis homojn serĉi lin. Fine oni trovis lin. Chong'er persone petis lian pardonon kaj persvadis lin reveni al la reĝa kortego. Sed Jie Zitui forlasis ilin kaj iris en malproksimajn montojn, tiel ke neniu povis trovi lin. Iu konsilis Chong'er meti fajron al la montoj por devigi Jie Zitui eliri el la montoj, kaj persvadi lin reveni al komfortoj de la vivo en la reĝa domo. Chong'er

konsentis pri tio kaj ordonis bruligi la monton, en kiu sin kaŝis Jie Zitui laŭdire. La fajroj furiozis dum tri tagoj, kaj Jie Zitui troviĝis apoganta sin kontraŭ granda arbo, portante sian maljunan patrinon surdorse. Ili ambaŭ estis mortintaj.

Chong'er estis profunde afliktita de tiu tragedio. Li ordonis konstrui templon por honori la memoron de sia plej lojala sekvanto. Li ordonis ankaŭ malpermesi fajrojn en la datreveno de la morto de Jie Zitui. Tial homoj manĝis malvarmajn manĝaĵojn en la tago de Hanshi. Krome, homoj komencis viziti la tombon de Jie Zitui kaj doni siajn respektojn al li.

Ĝis la dinastio Qing (1644-1911) antaŭ ĉirkaŭ 300 jaroj la praktiko de Hanshi aŭ manĝado de malvarmaj manĝaĵoj estis anstataŭigita per Qingming-Festo (Tomb-balaa Tago), kiu nun fariĝis grava okazo por fari oferojn al prauloj.



En antikva Ĉinio, Qingming ne estis la unika tempo por fari oferojn al prauloj. Fakte tiaj ceremonioj estis okazigitaj tre ofte, preskaŭ en ĉiu dua semajno, krom en aliaj gravaj ferioj kaj festoj. La formalaĵoj de tiuj ceremonioj estis ĝenerale komplikaj kaj multekostaj.

Por redukti tiun elspezon, imperiestro Xuanzong de la dinastio Tang (618-907) deklaris en la jaro 732, ke respektoj povas esti formale donitaj antaŭ la tomboj de prauloj nur en la tago de Qingming. Tio estas la kutimo, kiu daŭras ĝis nun. Tiutage homoj vizitas tombojn de siaj prauloj. Ili forigas herbaĉojn kaj forbalaas foliojn. Tial Qingming estas konata ankaŭ kiel la tago por balaado de tomboj. Homoj metas oferaĵojn antaŭ tombo, kovras tombon per nova tero, kaj plantas freŝan salikbranĉon sur tombo por elvoki la memoron pri la forpasinto.

Qingming estas tago ne nur por rememoro, sed



ankaŭ por festi la alvenon de printempo, ofte per ekskurso kaj pikniko. Kun la alveno de printempo, naturo vekiĝas, vestante la mondon en verdo. Ĉio estas nova, pura kaj freŝa. Printempo, precipe en Norda Ĉinio, estas la venta sezono, taŭga por flugigi kajtojn. Ne estas surprize, ke fluigo de kajto estas tre populara dum la periodo ĉirkaŭ Qingming. La historio de kajto en Ĉinio estas tre interesa. Oni diras, ke kajto estis elpensita de la fama legenda ĉarpentisto Lu Ban

antaŭ pli ol 2 000 jaroj.

Nuntempe Qingming-Festo fariĝis leĝa ferio de Ĉinio. La moroj iom ŝanĝiĝis, tamen en tiu tago oni ankoraŭ esprimas siajn tristajn pensojn pri forpasintoj en malsamaj manieroj.

Fonto: <http://esperanto.cri.cn/2521/2017/03/29/180s192311.htm>

## Nacia Esperanto Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj

sendis Angel Maglov, el Bulgario

**L**a 70-a kongreso de bulgaraj esperantistoj okazis inter la 20-a kaj 22-aa de aprilo en urbo Stara Zagora. La urbo estas situata en suda Bulgario kaj estas fama kun la nomo: "urbo de tilioj". Kiam floras tilioj la tuta urbo estas belega kaj la aromo estas ĉie. Ankaŭ la urbo estas konata kun plej rektaj stratoj en tuta Bulgario.

La kongreso okazis en la legejo "Kliment Ohridski". Belega vetero kun multe da suno renkontis la partoprenantojn. Partoprenis 131 esperantistoj el tuta Bulgario kaj 6 gastoj el najbaraj landoj - Serbio kaj

Romanio. Ĉefan raporton prezentis la prezidanto de BEA - s-ro Boris Gadĝanov. Li substrekis, ke multaj landaj societoj laboras bone, sed havas iujn, kiuj preskaŭ ne havas vivon. Granda problemo estas, ke ne havas kursojn por novaj esperantistoj.

Li distingis la societojn en urboj- Razgrad, Ruse, Pleven, Vraca. Poste, kiam komencis la diskutoj oni proponis bonajn ideojn por Esperanto movado.

Bedaŭrinde en niaj vicoj mankas junaj homoj. Tio estis substrekita de parolantoj.

Dimanĉe estis organizita interesa ekskurso ĝis etnografia komplekso "Damascena".

Denove belega vetero akompanis la esperantistojn.

Venontjare, en 2019, la kongreso okazos en urbo Burgas, ĉe Nigra maro. **ESPERANTO ESTAS NIA REVO, PRO TIO NI ŜATAS LA LINGVON.**

Kun amikaj salutoj...

**Angel Maglov, el Bulgario**



La 7 filinoj de Thaŭ Khabinla Phrom prenas la kapon.  
foto de educatepark.com

Tajlanda Novjaro (ankaŭ en Laoso, Kamboĝo kaj Birmo) En Tajlando Songkran-tagoj okazas inter la 13-a de kaj 15-a de Aprilo

ĉiujare. Tiam tajlandanoj vizitas siajn familiojn por lavi la manojn de gepartoj kaj parencoj kaj ricevi iliajn benojn. Ili vizitas templon por doni manĝaĵojn al

bonzoj, kie oni ankaŭ konstruas malgrandajn sablajn pagodojn. Tiu estas simbolo pri la pasinta tempo, kiam en temploj estis sablo, kaj vizitantoj revenante hejmen alportis tiun sablon ofte algluita al iliaj piedoj. Pro tio dum la Songkran-tagoj homoj faras sablajn pagodojn por redoni la sablon al la templo. Vespere oni, ĉefe gejunuloj, akvumas, ŝprucigas akvon al amikoj por amuziĝi kaj malvarmigi ĉar aprilo en Tajlando estas kutime la plej varma monato.

tradukis **Warut Bunpraset, el Tajlando**

Foto: <https://saluton-tajlando.blogspot.gr/2017/04/la-deveno-de-songkran-tagoj.html>

<<<

**A**ntaŭlonge estis riĉulo, kiu kvankam estis tre riĉa, li tamen estis kompatinda ĉar li ne havis filon. Lutage malriĉulo, kiu havis multe da gefiloj, kaj loĝis proksime de la riĉulo, mokis lin, dirante:

“Ho, ho, vi estas tre riĉa, vi havas multe da mono. Sed tio ne estas utila por vi ĉar vi ne havas neniun, kiu povos daŭrigi vian rason. Ha ha ha...!”

La riĉulo aŭdis tion kaj sentis sin malfeliĉa. Por tio li faradis ritajn ceremoniojn por peti filon el la dio, sed tio ne havis efektivan rezulton.

Do, la riĉulo turnis sin al dio Phra Saj kun rita ceremonio petante el la dio, ke li favoru doni al li filon. La dio Phra Saj ekkompatis la riĉulon, kiu bedaŭrinde ne povis havigi al si filon, kaj por tio li tuj iris al la Ĉielo por peti naskiĝon el dio Pra In (Indro). Pra In akceptis kaj donis anĝelon Thammaban Khuman por ke li naskiĝu kiel filo je la riĉulo.



La riĉulo petas el la dio Phra Saj (bildo el komkid.com)

Tempo pasis, Thammaban Khuman kreskiĝis kaj li estis tre saĝa filo. Li sukcesis finstudi la sanktajn librojn

Vedoj, kiam li havis nur 7 jarojn, kaj kapablis paroli ankaŭ la birdan lingvon. Tiun ĉi mirindan kapablon tuj aŭdis Thaŭ Khabinla Phrom (Brahmao) kaj li volis elprovi la saĝecon de Thammaban Khuman. Li venis al la Tero por starigi 3 demandojn al Thammaban Khuman:

- 1) kie estas Rasi (beleco, boneco) matene?
- 2) kie estas Rasi meztage?
- 3) kie estas Rasi vespere?

Do, Thammaban Khuman akceptis la elprovon kaj laŭ ilia interkonsento, se Thammaban Khuman ne sukcesus respondi ĝuste al la tri demandoj inter sep tagoj, lia kapo estus fortranĉita kiel oferaĵo al Thaŭ Khabinla Phrom. Sed se Thammaban Khuman sukcesus respondi ĝuste, tiam la kapo de Thaŭ Khabinla Phrom estus fortranĉita kiel oferaĵo al Thammaban Khuman.

Pasis ses tagoj, Thammaban Khuman ankoraŭ

ne sukcesis trovi la kaj pro tio li promenadis tien kaj reen. Poste li ripozis sub granda arbo, kie hazarde li aŭdis babiladon de birdoj.



"Hu, hu, morgaŭ ni ne devos serĉi manĝaĵojn ĉar ni certe manĝos la korpon de Thammaban Khuman, kiu ne povos respondi ĝuste al la demandoj de Thaŭ Khabinla Phrom"

kaj aldone, ili babilis pri la respondo.

"Ĉu vi scias, ke la respondoj estas treege facilaj? Nu, aŭdu: 1) matene Rasi estas sur la vizaĝo, tiel homoj lavas ĝin; 2) meztage Rasi estas sur la brusto, tiel homoj ŝprucigas akvon sur ĝin; kaj 3) vespere Rasi estas ĉe piedoj, tiel homoj purigas ilin. He, he, tre facila ĉu ne?"

Kiam Thammaban Khuman aŭdis, li tuj skribis ilin.



Thammaban Khuman aŭdas la babiladon de birdoj (bildo el mahamodo.com)

Finfine, Thammaban Khuman havis la ĝustajn respondojn. Li fiere respondis al Thaŭ Khabanla Phrom kiu laŭ la interkonsent

o fortranĉus sian kapon, Tamen se la kapo falus al la Tero, la Tero ja bruliĝus. Se la kapo falus en oceanon, la akvo de la oceano malaperus, kaj se ĝi forfetiĝus al la aeron, pluvo ne plu falus.

Pro tio li vokis siajn sep filinojn por preni la kapon kaj fari kun ĝi dekstruman rondiron ĉirkaŭ la monto Phra Sumen (monto Meru) kaj poste konservi ĝin en pagodon sur monto Kraj Rat (monto Kajlaŝo). Do, kiam la suno moviĝos al la ĉielloko Ŝafo de la zodiako, tiam la sep filinoj prenos la kapon kaj faros la dekstruman rondiron ĉirkaŭ la monto Phra Sumen kaj tiam estos la unua tago de Songkran-tago.

----

Songkran-tagoj aŭ Songkran-festivalo estas tradicie

## Peto al la Printempa Vento (facila)

verkis Elena Popova, el Bulgario

**P**ost la senneĝa vintro la tero atendis pluvan printempon. Kiu povus venigi nubojn, krom la printempa vento? De ĝiaj karesoj la arbaro ĵetas siajn malhelajn vestojn, vestas novajn, buntajn kaj komencas odori. Kaj de arbaro ĝis la vilaĝoj kaj urboj la vojo estas mallonga.

– Aŭdu min, mi de malproksime portas nubojn... estas peze al mi, mi ekploros! – malrapide eldiris la lacigita vento – Kiu min invitis? Kie mi haltu?

– Mi invitis vin – diris la tero – mi estas seka...

– Ni, la nudaj arboj! ...

– Ni, homoj kaj bestoj... ni soifas!

– Mi – per raŭka voĉo – diris la tegmenta defluilo – nur kun la pluvo mi povas kanti.

– Vento, ni ĉiuj kune vin petas, venigu ĉi tien la pluvajn nubojn. Ni mortos sen via helpo.

Tiam la printempa vento ĉesis. Ekpluvis. La vento sin kaŝis en la arbaro por dormi, kontenta de sia laboro.

– Dankon! Dankon! Dankon!... – diris gaje ĉiuj soifantoj.



verkis Elena Popova, el Bulgario



## La Aŭtunaj Muŝoj (parto 1)

de Irène Némirovsky

**K**araj geamikoj, karaj legantoj,  
Kun plezuro, mi prezentas al vi mian novan tradukaĵon.



Temas pri novelo, eĉ mallonga romano, de Irène NEMIROVSKY (1903-1942).

Irène naskiĝis en Ukraino (tiam Rusia Imperio) en juda familio, kiu parolis la francan. Kiam komencis la Rusia Revolucio, ŝi migris kun sia familio al

Francio, kie ŝi iĝis fama verkistino.

Arestita de francaj ĝendarmoj kaj deportita, ŝi estis mortigita de la nazioj en Aŭŝvico (Auschwitz).

Forgesita post la Dua Mondmilito, ŝi estas la sola verkisto, kiu ricevis la Premion Renaudot postmorte pro ŝia longa romano "Suite française" (2004).

Ŝian novelon "La Balo" mi jam tradukis en Esperanto.

(Ligiloj : [www.ipernity.com/blog/mike59/685797](http://www.ipernity.com/blog/mike59/685797)  
kaj ankaŭ ĉi tie: [novajhoj.weebly.com/libroj-en-](http://novajhoj.weebly.com/libroj-en-esperanto.html)

[esperanto.html](http://esperanto.html)

aŭ ĉe Facebook:

[www.facebook.com/groups/librejo/files](http://www.facebook.com/groups/librejo/files) )

Mi deziras al vi agrablan legadon!  
Koran dankon al IVAR kaj GINETTE pro la atenta legado kaj iliaj amikaj rimarkoj !

Dankon al TJERI pro liaj klarigoj.

**MIKELO (Michel Dereyger)**, el Francio



## LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

### Unua ĉapitro

Ŝi balancis la kapon kaj diris kiel antaŭe :

"Nu, adiaŭ Juroĉka... Bone zorgu pri via sanstato, karulo mia !..."

Kiel rapide pasis la tempo !... Kiam infano forironta en aŭtuno al la Moskva Liceo, tiel li venis en tiun ĉambron mem por adiaŭi ŝin.

Tio okazis antaŭ dek aŭ dek du jaroj...

Ŝi rigardis lian oficiran uniformon kun ia mirego, ia trista orgojlo.

"Ha ! Juroĉka, etulo mia, ŝajnas al mi, ke tio okazis hieraŭ..."

Ŝi silentis kaj faris lacan geston de l' mano.

De kvindek unu jaroj ŝi servis ĉe la familio Karin. Ŝi iam estis la nutristino de Nikolao Aleksandroviĉ,\* la patro de Jurij; ŝi edukis liajn gefratojn kaj poste liajn infanojn...

Ŝi ankoraŭ memoris pri Aleksandro Ciriloviĉ, mortigita dum la milito de Turkio en 1877, antaŭ tridek naŭ jaroj...

Kaj nun venis la vico de la etuloj Jurij kaj Cirilo, ke ankaŭ ili foriru al la milito...

Ŝi vespiris kaj faris krucosignon sur lian frunton.

"Iru, Dio vin protektos, karulo mia !"

"Nu jes ja, oldulino mia..."

Li ridetis rezignacie kun moka mieno.

Li havis dikan kaj freŝan vizaĝon de kamparano kaj ne similis la aliajn Karin.

Inter siaj etaj manoj li ekprenis tiujn de la maljuna virino, malmolajn kiel arboŝelo, preskaŭ nigrajn, kaj volis levi ilin al siaj lipoj.

Ŝi ruĝiĝis kaj subite retiris ilin.

"Ĉu vi estas freneza ? Ĉu mi aspektas kiel beleta junulino ? Iru nun, malsupreniru, Juroĉka ! Ili ankoraŭ dancas malsupre..."

"Adiaŭ, Njanjuŝka Tatjana Ivanovna" li diris per sia malrapida iom dorma voĉo kun ironiaj akcentoj, "adiaŭ. Mi alportos al vi silkan ŝalon el Berlino, se mi eniros tien, kio mirigus min. Ĝis tiam, el Moskvo mi sendos al vi grandan pecon da ŝtofo por la nova jaro."

Ŝi klopodis rideti, pinĉe plifermis la buŝon daŭre maldikan, sed premitan kaj enirantan, kvazaŭ ensorbitan de la maljunaj makzeloj.

Ŝi estis sepdekjaraĝa virino, kun fragila aspekto, de malalta staturo, kun vigla kaj ridetanta vizaĝo. Ŝia rigardo estis ankoraŭ kelkfoje akra kaj en aliaj momentoj laca kaj trankvila.

Ŝi skuis la kapon.

"Vi promesas multon kaj via frato similas al vi. Sed vi forgesos nin tie for. Nu, Dio nur bonvolu, ke ĉio baldaŭ finiĝos, ke vi ambaŭ revenos. Ĉu rapide finiĝos tiu malfeliĉo ?"

"Certe. Rapide kaj malbone !"

"Tiel oni ne ŝercu !" ŝi abrupte diris. "Ĉio kuŝas en la manoj de Dio."

Ŝi lasis lin kaj genuiĝis antaŭ la malfermita kofro.

"Vi povas diri al Platoŝa kaj Pjotr, ke ili supreniru preni la aferojn, kiam ili bonvolos. Ĉio estas preta. La peltaj manteloj kaj vojaĝkovriloj estas malsupre... Kiam vi foriros? Estas noktomezo."

"Tio sufiĉas, se ni troviĝos matene en Moskvo. La trajno forveturos morgaŭ je la dekunua."

Ŝi sopiris kaj balancis la kapon per sia kutima gesto.

"Ha ! Sinjoro Jesuo ! Kia trista Kristnasko !... "

Malsupre iu ludis rapidan kaj leĝeran valson per la piano. Aŭdiĝis la paŝoj de la dancantoj kaj la spronoj sur la malnovaj pargetoj.

Jurij mangestis.

"Adiaŭ, mi malsupreniras, Njanjuŝka!" \*

"Iru, koro mia !"

Ŝi restis sola.

Ŝi faldis la vestojn dirante duonvoĉe :

"La botoj... La malnovaj tualetaĵoj... tiuj povas ankoraŭ utili dum militiro... Ĉu mi nenion forgesis ? La peltomanteloj estas malsupre..."

Same kiel tridek naŭ jarojn antaŭe, kiam foriris Aleksandro Ciriloviĉ, ŝi enpakis la uniformojn, tion ŝi bone memoris, je Dio !... La maljuna ĉambrestino Agafia ankoraŭ vivis en tiu mondo... Tiam ŝi mem estis juna...

Ŝi fermis la okulojn, eligis profundan suspiron, malfacile restariĝis.

"Mi ja volus scii, kie troviĝas tiuj hundoj Platoŝka kaj Petka" ŝi grumblis.

"Dio pardonu min ! Hodiaŭ ili ĉiuj estas ebriaj !"

Ŝi ekprenis la ŝalon falintan teren, kovris siajn harojn kaj buŝon kaj malsupreniris.

-----

\* Nikolao Aleksandroviĉ = Nikolao filo de Aleksandro ; ks.


\* Njanjuŝka : "kara servistino" en la rusa.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

**L**a kvanto de individuaj membroj de UEA denove kresketas, tamen de rekorde malalta nivelo kaj tre malrapide. Ĉi-jare UEA eble havos 4.600 individuajn membrojn. Laŭ la strategia plano akceptita en 2013, la memborkvanto tamen devus esti 7.178.

Individuaj membroj de UEA 1979–2018



La ciferoj por 2017 kaj 2018 estas taksoj.

En 2016 la kvanto de individuaj membroj en Universala Esperanto-Asocio draste falis, kaj la estraro longe ne volis malkaŝi la membrostatistikon. En decembro 2016 Libera Folio tamen povis malkaŝi, ke la memborkvanto falis je 23 procentoj.

Laŭ definitiva statistiko por 2016, kiu fine aperis en la revuo Esperanto en aprilo 2017, la suma kvanto de individuaj membroj atingis 4.365, kiu estis malrekordo post la dua mondmilito.

La definitiva membrostatistiko por 2017 devis aperi en la ĵus publikigita aprila numero de la revuo Esperanto, sed ĝi ne troveblas tie. Demandoj pri ĝia manko ne ricevis respondon en la komitata diskutejo, sed al Libera Folio la **prezidanto de UEA, Mark Fettes**, respondis jene:



Mark Fettes

– La IM-nombroj estas jam tute klaraj, estas la AM-nombroj kiuj postulas kroman laboron de Martin, ĉar en diversaj kazoj li devas postĉasi landajn asociojn pri konfirmo kaj pago. Mi ne havas ĉemane tiujn ciferojn, tamen.

La plej freŝa oficiala cifero pri la pasintjara suma membronombro aperis en la komitata diskutejo en oktobro 2017, kiam la tiama ĝenerala direktoro Veronika Poór raportis, ke la asocio havas 4.355

individuajn membrojn. Kompare kun la sama dato la antaŭan jaron temis pri kresko de 132.

Ĉar la proporcio de homoj, kiuj membriĝas dum la lastaj monatoj de la jaro estas sufiĉe konstanta, laŭ tiu informo eblas taksii, ke la suma kvanto de individuaj membroj en 2017 atingis 4.400–4.450. Do, pasintjare la ŝrumpado almenaŭ por momento haltis.

(Jam post la apero de ĉi tiu artikolo, Martin Schäffer kontaktis Liberan Folion kaj informis, ke la suma kvanto de individuaj membroj en 2017 laŭ liaj ĝisnunaj kalkuloj iĝis 4.499.)

Ŝajnas, ke ankaŭ ĉi-jare la membraro de UEA kresketos, supozeble ne malplej pro la evidente alloga Universala Kongreso en Lisbono, kiu jam nun havas pli da aliĝintoj ol estis la suma kvanto en Nitro en 2016, aŭ en Seulo en 2017. Grandaj Universalaj Kongresoj ĉiam favore influas la memborkvanton de UEA, ĉar multaj membriĝas pro la rabatita kongresa kotizo.

Laŭ ciferoj publikigitaj de la nova ĝenerala direktoro de UEA, Martin Schäffer, la asocio en la komenco de aprilo havis 2.642 membrojn en la ĉefaj kategorioj, 59 pli ol je la sama dato pasintjare. Se la evoluo daŭros, tio signifas, ke UEA realisme povus dum 2018 atingi 4.600 individuajn membrojn.

**La multjara ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller**, en la komitata diskutejo tamen avertis, ke en aprilo estas ankoraŭ tro frue fari fidindajn prognozojn:

– Mi kutimis unuafoje informi pri la membroevoluo komence de majo. Pli frue povas influi hazardaj aferoj, ekzemple ke perantoj ne anoncas la ricevajn kotizojn ĉiujare laŭ la sama ritmo. En aprilo la situacio kutime sufiĉe stabiliĝas.

Eĉ se UEA kresketos kompare kun la du antaŭaj jaroj, la evoluo de la membraro estas nekontentiga, skribis **Martin Schäffer** en la komitata listo:

– Por la buĝeto oni kalkulis kun pli da membroj ol nun estas, do rimedoj estos malpli altaj ol prognozitaj (se ne okazas ŝanĝo de evoluo dum la resto de la jaro). Se oni faras prognozon laŭ la nunaj ciferoj, fine de la jaro povus manki enspezoj en alto de ĉ. 8.000 – 10.000 EUR kompare kun la buĝeto.



Martin Schäffer.

**Osmo Buller en la komitata diskutejo** instigis la

Centran Oficejon rapide restarigi la malnovajn rutinojn pri revarbado de membroj.



Osmo Buller.

– La plej grava el ili estas la dissendo de la unua rememorigo al la nepagintoj en majo. Laŭ mi oni prefere uzu paperan poŝton, almenaŭ al la landoj kun “plena” kotizo. La rememorigo necesas, ĉar la kaŭzo n-ro 1 de ne-rememorigo estas forgeso aŭ

preteratento. Ju pli pasas la tempo, des malpli verŝajne forgesemuloj rekotizas. La neglekto de la rememoriga praktiko perdigis centojn da membroj, ĉar revarbi iun post unu aŭ du jaroj estas multe pli malfacile ol post kelkaj monatoj.

**Renato Corsetti** aliflanke rezignacie konstatis, ke “la UEA de nia juneco ne plu ekzistas”, kaj refoje konsilis al la estaro nuligi la paperajn revuojn por ŝpari monon.



Renato Corsetti.

– La papera revuo, kara al nia koro, ne plu ŝajnas altiri homojn, kiuj apenaŭ [tiele] ili povas elektas kategorion sen papera revuo. Ankaŭ tiurilate la labor-grupo

konsilis transiri al nepapera revuo.

**Laŭ la strategia plano de UEA**, kiu estis ellaborita sub la gvido de Mark Fettes kaj aprobita en 2013, kiam li prezidantiĝis, la membraro de la asocio ĉiujare kresku je 10 procentoj.

Ĉar UEA en 2013 havis 4.903 individuajn membrojn, la memborkvanto ĉi-jare devus atingi minimume 7.178. Tiu celo nun aspektas same neatingebla kiel la ceteraj celoj starigitaj en la ampleksa plano.

**Atentigo:** La artikolo pli frue enhavis la aserton, ke la membrostatistiko por 2017 ankoraŭ ne aperis, ĉar ĝenerala direktoro Martin Schäffer ne havis tempon prepari ĝin. Jam post la apero de la artikolo Martin Schäffer kontaktis Liberan Folion por atentigi, ke tia interpreto de la faktoj estas erara. Jen kion li skribis: Ne estis “tempo”, kiu malhelpis la finpreparon de la statistiko. Plene la kaŭzo estis, ĉar pluraj LA ankoraŭ ne respondis / pagis. Tute ne rilatas al mia tempo-dispono.

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2018/04/06/la-srumpado-de-uea-momente-haltis/>

## Trezoro Huang Yinbao – nova estrarano de UEA

-- el La Balta Ondo

**L**a 21an de aprilo la prezidanto de UEA Mark Fettes informis pri la rezulto de la reta voĉdonado en la komitato de UEA pri elekto de du pliaj estraranoj de UEA. Ĉi-sube estas lia informo.

Finiĝis la voĉdono pri elekto de du pliaj estraranoj. Partoprenis 46 komitatanoj el 62, do la voĉdono estis kvorumo. Por elekto necesis ricevi almenaŭ duonon de la eblaj voĉoj, do 23. 8 komitatanoj voĉdonis sindetene (ili voĉdonis por neniu kandidato).

La kandidatoj ricevis jenajn voĉojn: Trezoro – 25, Orlando Raola – 22, Amri Wandel – 10, Barbara Pietrzak – 5, Bruĉjo Kasini – 2 ĝis 14\*

Mi metis steleton ĉe la rezulto ĉe Bruĉjo, ĉar dum la voĉdonado nia teknika helpanto Paul Helly konstatis problemon specife pri la registrado de voĉoj por li (la sistemo ne kalkulis ilin). Paul korektis la problemon, sed ni frontis eblan bezonon denove malvalidigi la voĉdonon, ĉar ni ne scias, kiom da voĉoj Bruĉjo ricevis antaŭ la korekto. Tamen la finaj rezultoj montras, ke tiuj voĉoj ne povus esti sufiĉaj por elekti lin. 38 komitatanoj voĉdonis por almenaŭ unu kandidato, do la suma nombro de eblaj voĉoj estas 76. Ni havas certecon pri 64 el tiuj voĉoj, do restas 12, kiuj estis aŭ voĉoj por Bruĉjo (antaŭ la korekto) aŭ

voĉoj por neniu (se la koncerna komitatano uzis nur unu el siaj du voĉoj). La maksimumaj voĉoj por Bruĉjo estus do 14.

Ni havas do klaran rezulton. Nur unu kandidato ricevis pli ol duono de la esprimataj voĉoj, nome Trezoro, kiu fariĝas do la 7a estrarano. Mi gratulas kaj bonvenigas lin!

Mi krome esprimas elkoran dankon al la aliaj kvar kandidatoj – kaj kondolencojn al Orlando, kiu maltrafis la sojlon por elekto per nur unu voĉo! Ni esploras kun li la eblojn de pli proksima kunlaboro sur la kampoj, kiuj interesas lin. **(Mark Fettes)**

Fonto: <http://sezonoj.ru/2018/04/trezoro-11/>



**J**ulio 1921. La unua numero de la revuo "BIZANTIO" eldonita en Konstantinopolo de la samnoma Konstantinopola Esperanto Asocio "Bizantio". En la interno foto de la fondintoj de la Asocio (1920).

Spiros Sarafian

Fonto: [https://www.facebook.com/permalink.php?story\\_fbid=580232028999218&id=562367837452304](https://www.facebook.com/permalink.php?story_fbid=580232028999218&id=562367837452304)



**Klarigoj:**

"Bizantio" estas la nomo de la dua el la kvar asocioj fonditaj en Istanbul Turkujo ĝis nun. La fondinto estis la kuracisto Anakreon Stamatiadis post sia translokiĝo al Istanbul el la insulo Samoso en la Egea maro.

Bedaŭrinde estas tre malmultaj evidencoj kaj memoraĵoj el la Esperantaj asocioj kaj tiuj de la dua asocio nun troviĝas en Ateno ĉar en la jaro 1925 Stamatiadis translokiĝis al Ateno. Restas nur kelkaj memoraĵoj el la kvara asocio.

Istanbulon, tiam en la lastaj jaroj de la Osmana imperio, oni nomis Konstantiniye aŭ Konstantinopolo. Poste la nomo de la urbo ŝanĝiĝis al Istanbul.

Ĉi tiuj fotoj estas (1) la kovrilo de la unua numero de la revuo (2) la foto de la fondintoj de la asocio.

Vasil Kadifeli



Solvo de la krucvort-enigmo

A	Ŭ	K	C	I	E	J	O
S	A		U	L	M	O	N
O	K	A		I	A	M	A
A	R	T	O		S	I	N
K	I	R	K	O		Ŝ	A
	Ĉ	A	S	T	O		B
O		M	O	R	D	O	
K	O		B	A	R	D	O
I	R	O		M	I	A	N
R	I	D	O		B	E	A
U	S	O	N	O		B	L
Z	A	M	E	N	H	O	F